

Ferenc Molnár

LA NEKONATA KNABINO



Hungaria Esperanto-Asocio

e-libro HEA

Ferenc Molnár

La nekonata knabino

Drama historio en 3 aktoj 7 bildoj

**Hungaria Esperanto-Asocio
Budapeŝto 2025**

Originala titolo: Az ismeretlen lány
Eldonis: Athaeneum Irodalmi és Nyomdai R.-T. Budapest, 1934

Tradukis el la hungara originalo: Jozefo Horvath

Eldonis: Hungaria Esperanto-Asocio

Titolpaĝo: Jozefo Horvath

ISBN 978-963-571-519-0

@Horváth József 2025

e-libro HEA

Personoj

Grafo Armaila

Anjo

Rudolfo

S-ino Pál

Manjo

Admiralo

Poŝtoficisto

Georgi

Fr-ino Elinjo

Posedanto de dancdrinkejo

Steĉjo

Karlo

Poŝta ĉefoficisto

Asista kuracisto

Artmeblisto

Kelnero

Ĝendarmo

Servisto

Dancistino

Knabino

Unua maristo

Dua maristo

Unua damo

Dua damo

Gasto

Dancantoj en la amuzejo

Sanatoriaj gastoj

UNUA AKTO

Unua bildo

Mizera dancamuzejo en Triesto en la haveno, iun majan nokton je la tria horo. Enirejo el la strato. Verŝotablo. Du tabletoj, kelkaj seĝoj. En la fono: malalta opala vitrovando kun iom detirita kurteno, post kiu videblas kelkaj dancantaj paroj kaj malmultaj gastoj sidantaj ĉe tabloj.

Tie sonas muziko, mallaŭte, kun paŭzoj.

Ĉe tablo sur la scenejo pli aĝa homo de metiista aspekto, artmeblisto sidas kun du knabinoj. Ambaŭ knabinoj estas dungitaj ĉi tie kiel trinkinstigaj damoj, pargetdancistinoj. Ili estas vestitaj en ĉipa vespera tueleto kun dekoltaĵo. Unu estas Anjo. La posedanto estas okupata malantaŭ la verŝotablo en blanka jako, kelkfoje elportas trinkaĵojn en la malantaŭan parton. Lia kelnero en trivita blanka jako same el- kaj reiradas.

Artmeblisto (iom ebrie al la knabinoj): Se vi eltrinkos ĉi tiun glason ĝisfunde, vi ambaŭ ricevos veran, bongustan kison. Je mia honorvorto!

Dancistino: Prefere donu ion pli seriozan, ni diru silkan tukon aŭ oran horloĝon!

Artmeblisto: Povas temi ekskluzive nur pri kiso!

Anjo: Mi proponas prefere: eltrinku vi mem ambaŭ glasojn da vino, tute ĝisfunde, kaj vi ricevos de ni ambaŭ po unu kison.

Posedanto (elde la tablo): Jen estas saĝa parolo!

La artmeblisto eltrinkas la du glasojn da vino, la du knabinoj ridas, poste dum ŝriketoj kaj ridoj kisas lin.

Kelnero: Ne en Parizo ni estas, sinjoro, sed en Triesto. En Triesto. Kaj tie en la haveno!

Posedanto: Ankaŭ en la haveno oni ja povas trinki vinon. Rigardu la s-ron artmeblisto, li trinkas vinon. Kulpas vi, ke vi ne proponas vinon.

Kelnero: Jes ja, mi proponadas. Sed oni ne bezonas ĝin, ĉar ĝi kostas multe.

Posedanto: Rumo kaj biero. Biero kaj rumo.

Kelnero: Kion mi povus fari, se la mondo tiom koruptiĝis. (Dispor-

tas la trinkaĵojn, revenas.)

Artmeblisto (*montras bankbileton*): Kiu pli amas la oĉjon?

Dancistino: Mi! Mi! (*Etendas la manon por la mono.*)

Artmeblisto (*al Anjo*): Ĉu vi ne amas la oĉjon? Kvankam la oĉjo amas vin! (*Donas la monon al ŝi.*)

Anjo (*sputas superstiĉe sur la monbileton*): Via patro, via patrino venu al mi! (*Ŝovas ĝin en sian ŝtrumpon.*)

Dancistino: Ĉu mi ricevas nenion?

Artmeblisto: Se nun Anjo kisos la oĉjon, tiam ankaŭ vi ricevos.

Anjo: Bone, sed nur por ĝojigi mian amikinin. (*Brakumas la artmebliston. Tiu donas monon al la dancistino.*)

Posedanto (*al la kelnero, apoganta sin al la verŝotablo*): Nu! Ĉu neniom da biero, neniom da rumo?

Kelnero: Nun oni dancas.

Anjo: Ankoraŭ unu botelon da vino al la oĉjo artmeblisto.

Posedanto: Jes, tuj. (*Elserĉas unu.*)

Kelnero (*alkuras, rekuras, priservas. Reiras ripozi ĉe la verŝotablo*): Ŝi estas tre lerta knabino, ĉi tiu Anjo.

Posedanto: En la tuta haveno vi ne trovas pli bonan.

Kelnero: Nek en la urbo. (*Ekatentas al la enirejo.*) Ps!

Posedanto: Kio?

Kelnero: Mi kredas, aŭto haltis surstrate, ĝuste antaŭ ni. (*Rapidas al la enireja pordo, fortiras la tulan kurtenon, elrigardas*): Jes, ĝi haltis ĉi tie. Smokingaj sinjoroj elaŭtiĝas, s-ro ĉefo, smokingaj sinjoroj venas!

Posedanto (*alkuras, elrigardas*): Dio en la alto! Ĉu vi scias, kiu li estas. Alta ĉielo! Grafo Armaila!

Kelnero (*elrigardante*): Nun ili konsiliĝas.

Posedanto: Grafo Armaila kun siaj amikoj! Ili venas ne ĉi tien. (*Ili plu rigardas.*)

Kelnero: Tamen ili venas ĉi tien.

Posedanto: Ĉu grafo Armaila, en mian mizeran tavernaĉon? Estus absurde! Sed ne, ne. Ili fakte venas ĉi tien! (*Kun profunda riverenco malfermas la pordon antaŭ ili.*)

Grafo Armila envenas kun Steĉjo kaj Karlo. Ĉiuj tri surhavas smokin-gon, ne ĉapelon. Bonhumoraj, estas jam iom trinkintaj. Armila estas sesdek-jara, eleganta maljunulo. Steĉjo kaj Karlo estas tridek- ĝis tridek-kvinjaraj elegantaj sinjoroj, junaj amikoj de la grafo.

Posedanto kaj **kelnero**: Via humila servisto, mi havas la feliĉon. Via plej humila servisto.

Grafo (*ĉirkaŭrigardas, al Karlo*): Ĉu ĉi tiu?

Karlo: Jes, ekscelenca moŝto, ĉi tiu ĝi estas.

Grafo: Mi diris: konduku min en la plej lastan dancamuzejon!

Karlo: Ĉi tiu ĝi estas, ĉi tiu.

Grafo (*al la posedanto*): Sinjoro, mi postulis de miaj amikoj kiel fer-mon de la diboĉoj, konduki min en la plej mizeran, plej lastan noktan amuzejon de Triesto. Ĉu ĉi tiu ĝi estas?

Posedanto: Jes ja, ekscelenca moŝto, ĉi tiu estas la plej lasta tavernaĉo en tuta Triesto, en la haveno, pli mizera kaj pli lasta ne trov-eblas. Bonvolu okupi lokon!

Ili sidiĝas ĉe malplena tableto. La posedanto kaj la kelnero atendas la mendojn.

Grafo: Por diri sincere, mi trinkis multe en la klubo, poste ankaŭ en Eldorado... Kie ni ankoraŭ pasis?

Karlo: En Excelsior, British Dancing, Eldorado Bar... Ankaŭ mi plenas ĝisgorĝe de ĉampano.

Grafo: Mi plej volonte trinkus botelon da bone malvarma biero.

Je la senespera gesto de la posedanto kaj la kelnero.

Steĉjo: Ne iĝu tiel senesperaj. Alportu botelon da biero kaj botelon da ĉampano. Kiujn ĉampanojn vi havas?

Posedanto: Unusolan botelon da Mumm por la kazo, se foje ta-men...

Steĉjo: Nu do, tiu kazo alvenis. Donu ĝin al ni.

Posedanto (*al la kelnero*): Botelon da Mumm, sed la plej belan!

Kelnero: Jes ja. (*Forkuras.*)

Posedanto: Dume mi elportos la bieron. (*Kuras malantaŭ la verŝo-*

tablon.)

Artmeblisto (*al la kuranto*): S-ro ĉefo, ĉu vi ne ŝatas la oĉjon artmeblisto?

Posedanto: Lasu min en paco! (*Elprenas bieron kaj surtabligas ĝin, post kiam sternis blankan tablotukon.*)

Grafo (*trinkas bieron*): Ne ekzistas pli refreŝiga trinkaĵo post tiom da ĉampano kaj viskio ol glaso da bone malvarma biero! Ĝi gustas bone.

Artmeblisto (*al la flankenstariĝinta posedanto*): Diru, kiu estas la ulo, por kiu vi tiom saltaĉas?

Posedanto: Li estas grafo Armila, la riĉega milionulo, kiu havas grandegan kastelon sur la bordo de la grandega maro.

Artmeblisto (*ekfajfas rekone.*)

Intertempe la kelnero alportas la ĉampanon kaj surtabligas ĝin.

Grafo: Nu, ĉu vi kredas, ĉu ne, mi estas profunde tuŝita. Havi tian bonŝancon!

Steĉjo: Kvankam ne unufoje vi jam gajnis tian sumon, ekscelenco, en la klubo, ankaŭ en Monte Carlo.

Grafo: Propre ne la sumo interesas min. Prefere la maniero, kiel mi gajnis ĝin.

Steĉjo: Ĝi estis efektive miriga. Al mi koaguliĝis la sango en la vejnoj.

Karlo: Mi ne povis alrigardi. Mi fermis la okulojn, kiam mi vidis, ke via moŝto petas karton post la sepo.

Grafo: Kion alian mi povus fari? Vidu, mi havis sepon, unu keran damon kaj unu pikan sepon. Luzsinszky petis karton. *Carte!* Mi donas al li unu kvinon. La regulo estas, ĉu ne, ke mi devas halti post sepo.

Karlo: Ĝuste.

Grafo: De kiam mi vivas, mi ĉiufoje ankaŭ haltis.

Karlo: Neniu petas karton post sepo.

Grafo: Nu jes, sed en tiu momento mi rimarkis sur la vizaĝo de Luzsinszky vibreton, kaj en ĝi videblis ĝoja surprizo, eĉ iom pli: iom da ironia fiĝojo, iom da malico. Vi scias, Luzsinszky ne ŝatas min, kaj jam tre

multe mi forgajnis de li dum mia vivo... sed, kreu min, tio okazis dum centono de minuto... mi certis, ke li havas okon aŭ naŭon, tial li rigardis kun triumfo mian nigran sepon... kaj tiam, Dio helpu, pro spito mi petis karton en la certa kredo, ke mi perdos la partion, kvankam temis pri vere bela sumeto...

Karlo: Ho, vere tre bela!

Grafo: Kaj do... vi vidis... mi malkovras la karton: pika duo. Luzsinszky fariĝis tiel blanka kiel ĉi tiu tuko...

Karlo: Nu, pli blanka ol ĝi.

Grafo: Vi pravas. Sed mia psikologio estis ĝusta, ĉu? Li havis okon. Kiun vi rigardas, Steĉjo?

Steĉjo (*rigardinta Anjon*): Tiun flavvestan. Se konsideri la lokalon, kie ni estas, ŝi estas tre agrabla fenomeno.

Grafo (*alrigardas*): Ne malbona. Luzsinszky foriris tiel el la klubo, ke mi kredas, longe li ne prenos kartojn en la manojn.

Karlo: Kolerigas ne malmulte sidi tie kun la certa oko tiel, ke la bankiero havas sepon, kaj subite repensas, freneziĝas kaj petas novan karton.

Grafo: Tio estas ankoraŭ ne tute ĝena. Kolerigas propre, ke la bankiero prenas post la sepo duon! Tio estas la vera kolero! Se ŝi plaĉas al vi, Steĉjo, ni povas alvoki ŝin.

Steĉjo: Nu, ne tiom ŝi plaĉas.

Karlo: Per kio klarigis Luzsinszky, ke li ne venis kun ni?

Grafo: Mi vokis lin nur pro ĝentileco por glaso da ĉampano, sed mi agnoskas, ke li ne havis multan emon pasigi la restintan parton de la nokto en mia societo. Li estis tiel ĉagrenita, ke mi preskaŭ redonis al li...

Karlo (*interrompas lin*): Nu, nu!

Grafo: ... la duonon. Ĝi estas ja propre trovita mono.

Karlo: Ĉiu kartluda gajno estas trovita mono. Se la malgajno estas perdita mono, la gajno do trovita mono.

Grafo: Sed ĉi tiu estis pli trovita ol la trovita.

Karlo: Tial vi jam disŝutis ĉirkaŭ ĝian duonon...

Grafo: Ne, tute ne...

Karlo: Nu, kial vi asertas... la pordisto ricevis milon, la ĉefĉambristo milon, la ŝoforo milon; kiom vi donis al la almozulo antaŭ Eldorado?

Grafo: Du milojn.

Karlo: Jen vidu! Kaj la vestogardisto kaj la kluba kelnero, kaj la sumo, kiun vi sendis al la fileto de la ĉambristo... kaj kion vi donis al la knabinoj en Eldorado, Excelsior kaj British Dancing... jam kompleta havaĵo!

Grafo (*rigardante Anjon, kiu tenas la artomebliston brakumita*): Estas ja friponoj ĉiuj, kiuj metas tian monon en ŝparon. Vi pravas, Steĉjo, ke la damo estas sufiĉe fajna fenomeno. Kompare al la lokalo... vera princino.

La posedanto jam atentis.

Steĉjo (*al la posedanto*): Bonvolu sendi al ni por momento tiun principessa. Ne por pli longe ol minuto.

La posedanto tuj komencas trakti kun Anjo.

Posedanto (*aperas kun Anjo ĉe la tablo*): Mi havas la feliĉon prezenti la principessa. Ŝia nomo estas Anjo.

La tri sinjoroj stariĝas. Anjo faras kortegan riverencon. La posedanto alŝovas seĝon kaj portas glason por Anjo.

Grafo: Principessa, honoru nian tablon!

Anjo: Dankon. (*Sidiĝas.*)

Posedanto tuj verŝas al Anjo.

Grafo: Mia amiko Steĉjo, kiu rigardas ĉion el estetika vidpunkto, trovis vin fajna fenomeno.

Anjo: Kiu estas Steĉjo?

Steĉjo: Estas mi.

Anjo (*al li*): Dankon.

Grafo: Mi, miaflanke aliĝas al lia opinio. Ne pro amikeco sed pro konvinkiĝo. Ne dormu, Karlo, damo sidas ĉe nia tablo.

Karlo (*alarmiĝas*): Mi kisas viajn manojn.

Grafo (*kun biero*): Dio vivigu vin longe, kara Anjo!

Ĉiuj trinkas. Knabino en pimpa, ĉipa vespertualeto envenas el la malantaŭa parto de la lokalo kaj apogas sin al la verŝotablo, traktas kun la posedanto.

Anjo (al la grafo): Ĉu vi trinkas bieron?

Grafo: Jes. Kial? Ĉu omeno?

Anjo: Ĉampano estas pli bona aŭguro.

Steĉjo: Ankaŭ ĝin ni havas. Kion vi trinkis ĉe via tablo?

Anjo: Vinon.

Steĉjo: Kiu estas tiu afabla oĉjo?

Anjo: Artmeblisto.

Steĉjo: Ho ha!

Grafo: Kial li bezonas du knabinojn?

Anjo: Nu, li estas metiisto. Laboras la tutan semajnon.

Grafo: Mi volus vidi dum dancado.

Anjo: Ĉu la artmebliston?

Grafo: Ne. Vin. Aŭ prefere Anjo, knabineto. Ĉu vi permesas, ke mi alparolu vin per via baptonomo? Tia maljuna oĉjo ...

Anjo: Mi prenas tion por honoro.

Grafo: Anjo, ĉu vi estas dancistino?

Anjo: Mi ankaŭ dancas. Sed mi ne ŝatas danci. Kelkfoje mi devas, ĉar mi estas dungita ĉi tie.

Knabino (elde la verŝotablo al la grafo): Mi petas vin, oĉjo...

Grafo: Kiu oĉjo?

Knabino: Vi, vi mem.

Grafo: Ĉu mi?

Knabino: Jes. Ĉu mi povas aĉeti cigaredojn por la konto de Anjo?

Grafo: Kompreneble, *signorina*. Bonvolu!

Knabino: Dankon, Anjo!

Ŝi aĉetas cigaredojn kaj reiras en la malantaŭan parton.

Anjo (*senkulpigas ŝin*): Ŝi havas iom da vaporo en la kapo.

Grafo: Ne gravas. Kaj vi, Anjo?... Ĉu vi jam trinkis multe hodiaŭ nokte?

Anjo: Ne.

Grafo: Ĉu viaj gepatroj loĝas ĉi tie?

Anjo: Ne.

Grafo: Kie vi enhejmas?

Anjo: Mi naskiĝis en Pola.

Grafo: Kio estis la profesio de via patro?

Anjo: Mi ne havas patron. Mia patrino estas muzikisto en virina bando.

Steĉjo: Anjo, ĉu vi ne havas patron?

Anjo: Vi ne *anjumu* min! Mi ne havas patron.

Steĉjo: Pardonon.

Grafo: Kiel vi, fraŭlino ne havas patron?

Anjo: Vi ankaŭ plu *anjumu* min! Mi ne havas patron, nek generan, nek teneran. Mi estas neleĝa.

Grafo: Estas tute certe, ke iu grandsinjoro, iu aristokrato estas via patro.

Anjo: Ej nu, kiel profunde analizas min la sinjoroj. Apenaŭ homo de pli bona speco venas en tian mizeran lokon, tuj li dissekcas knabinojn. Kiel kuracisto kuniklojn en la kliniko. Je ni ili studas la virinan mizeron. Se estas tiel, do la artmeblisto estas pli bona. Tiu ne analizas,

Grafo: Kion do li faras?

Anjo: Li konversacias kiel decas al homo.

Grafo: Vi ne devas miskompreni tion, vi kolerema knabino. De nia flanko tio ne estas scivolo sed interesiĝo. Tiel nomata afabla interesiĝo. Ĉar, vi estas simpatia al ni, Anjo. Tial mi ankaŭ ne ĉesos demandi. Sekve, vi ne scias, kiu estis via patro.

Anjo: Ne.

Grafo: Vi naskiĝis en Pola.

Anjo: Jes.

Grafo: Pola, Pola. Milita haveno. Ĉu li estis ŝipoficiro?

Anjo: Povas esti. Mi ne konis lin. Li mortis.

Paŭzo.

Steĉjo: Ĉu vi volonte mangus ion?

Je tio la posedanto alpaŝas.

Anjo: Jes, volonte.

Steĉjo: Kion vi bonvolas?

Anjo: Buterpanon.

Steĉjo: Ĉu ne prefere kaviaron?

Anjo: Ne.

Steĉjo: Unu buterpanon, s-ro ĉefo, la plej bonan!

La posedanto foriras kaj ŝmiras panon.

Du maristoj envenas el la malantaŭa parto kaj iras al la enireja pordo.

Ili iras hejmen. Dume unu vokas al Anjo.

Unua maristo: Saluton, Anjo!

Dua maristo: *A rivederla*¹, Anjo!

Anjo manadiaŭas lin.

La du maristoj foriras.

Steĉjo: Ĉu amikoj?

Anjo: Ne, nur bonaj konatoj. (*al la grafo*) Kion vi tiom rigardas?

Grafo: Viajn okulojn. Vi havas inteligentajn okulojn.

Anjo: Dankon. Kvankam ion tian oni rimarkas pri hundetoj.

Grafo: Vi estas iom sentema. Sed inteligente sentema.

Anjo: Da menso mi havas. Ho, se mi nur ne havus!

Grafo: Kaj kiel bele vi kapablas sidi sur la seĝo. Ne troviĝas dek inter cent virinoj, kiuj kapablas bele sidi. Ne dormu, Karlo, damo sidas ĉe nia tablo.

Karlo (*alarmiĝas*): Mi kisas vian manon.

Steĉjo: Kiom serioze iĝis inter ni. Se ni ne demandas ŝin, ŝi ne parolas. Kaj se ni demandas ŝin, ŝi respondas en strikte telegrafa stilo. Ĉu ni ne estas simpatiaj?

La posedanto metas la buterpanon antaŭ Anjon.

Anjo (*anstataŭ respondi manĝas la buterpanon, elegante per tranĉilo kaj forko.*)

Grafo: Kaj ŝi ankaŭ bele manĝas. Eĉ dudek tri el cent virinoj ne

¹ Ĝis revido! (itale)

troviĝas, kiuj scipovus solvi la problemon pri buterpano kun tiela gracia.

Steĉjo: Ne metu ŝin en embarason!

Anjo: Li ne metas min en embarason. (*Manĝas.*)

Grafo: Ja vere, iĝis serioze inter ni. Pli frue ĉe la artmeblisto vi kondutis tre senbride.

Anjo: Depende, kun kiu mi estas.

Grafo: Sufiĉe bona respondo.

La posedanto staras tie zorgeme.

Steĉjo: Ĉiuokaze tio atestas ŝatindan modeston.

Posedanto: Mi petas pardonon, sed ne kaptiĝu de ŝia modesto. Interne ŝi estas rekte sovaĝa.

Steĉjo: Kia?

Posedanto: Sovaĝa (*Anjo ĵetas al li rigardon.*) Jes, tiel. Mi bone konas ŝin. Nun ŝi estas serioza, ja estas emociita.

Anjo: Mi ne estas emociita. Eĉ joton ne. Nur mi ne havas bonan humoron.

Grafo: Kial?

Anjo: Mi ne scias.

Grafo: Ĉi tiu estas jam magra respondo.

Grafo: Ho, alifoje ŝi ne estas tia. Sed nuntempe ŝi ne havas bonan sanon.

Grafo: Kian malsanon ŝi havas?

Posedanto: Ŝi tusadas. Ŝi vizitis ankaŭ kuraciston.

Grafo: Nu, tio estas ne bona, sed el tio ni eksciis ne multe. Anjo, ĉu vi havas febron.

Anjo: Ne.

Grafo: Kion diris la kuracisto?

Anjo: Ke mi estas malsana. Miaj nervoj ĉifiĝis. Kaj mi estas tro anemia. Ankaŭ nun doloras mia kapo.

Grafo: Ĉu tro?

Anjo: Sufiĉe bele.

Grafo: Kial vi do ne iras hejmen, Anjo?

Anjo: De tio la doloro ne ĉesos. (*Trinkas ĉampanon.*)

Grafo: Rigardu, ŝi ne levas la etfingron, kiam ŝi trinkas. Mi abomenas, se virino levas la etfingron ĉe trinkado.

Steĉjo: Ŝi havas belajn manojn.

Grafo: Ŝiaj manartikoj estas delikataj. Troviĝas maleol-adorantoj, mi rigardas la manartikojn ĉe virinoj. Ĉu ankaŭ tiuj de via patrino estas tiel delikataj?

Anjo: Ne.

Grafo: Mi diras: lia patro estis delikata homo.

Steĉjo: Ni interkonsentu: li estis korvetkapitano. Kial asertas la tre estimata s-ro knabinkomercisto, ke vi estas sovaĝa, fraŭlino?

Posedanto: Sinjoro, ŝi estis ankoraŭ duone infano, kiam ŝi jam eskapis elhejme, ĉar ŝi ekdeziris ĉi tiun sovaĝan vivon kaj...

Grafo: Ne vi respondu, vi maljuna knabinpruntisto. Vi, respondu, kara Anjo!

Anjo: Li diras veron. Mi eskapis de mia patrino.

Grafo: Kial?

Anjo: Patrino elmigris al Ameriko kaj volis kunpreni min. Sed mi estis enamiĝinta al kelnero. (*al la posedanto*) Vi konas lin. Ludoviko. Pro li mi restis ĉi tie sola. Ho, patrino jam de ĉirkaŭ du jaroj eĉ ne skribis. Mi ne scias, kie ŝi restadas, kio okazis al ŝi. Mi ne ŝatas paroli pri tio.

Grafo: Kaj la kelnero? Ludoviko?

Anjo: Post monato li forlasis min. Li edziĝis. Mi aĝis dek ok jarojn.

Grafo: Kaj?

Anjo: Mi malfermis la vejnojn.

Steĉjo: Ĉu sur ĉi tiu bela manartiko.

Anjo: Ne. Sur la alia. Sed mi saviĝis.

Grafo: Kaj nun?

Anjo (*silentas.*)

Posedanto: Nun ŝi vivas.

Anjo: Ne. Mi ne vivas. Nur tiel aspektas.

Grafo: Do?

Anjo: Mi ne scias.

Paŭzo. Silento.

Grafo: Ne dormu, Karlo!

Karlo (*endorme, mallaŭte*): Mi kisas viajn manojn.

Grafo: Mi ne komprenas ĉi tiun „mi ne vivas”. Ĉu vi ne havas revojn? Ĉu vi deziras nenion? Ĉu vi ne sopiras ion?

Anjo: Ne.

Grafo: Ba! Tiel viglamensa knabino! Iam deziron tamen vi havas. Vi ŝatus ion fari, ĉu?

Anjo: Mi ŝatus... mi ŝatus resaniĝi.

Paŭzo.

Grafo: Ĉu vi scias, ke vi estas tre plaĉaspekta?

Anjo: Mi scias.

Grafo: Ke vi aspektas kiel iu inda je pli bona sorto?

Anjo: Mi scias.

Grafo: Kaj vi tamen estas ĉi tie.

Anjo (*levas la ŝultrojn*): Kion mi faru?

Grafo: De kiam vi estas ĉi tie... en ĉi tiu lokalo?

Anjo: De tri jaroj.

Grafo (*pri la artomeblisto*): Kiu estas tiu ebria homo? Ĉu via amato?

Anjo: Ne.

Grafo: Do?

Anjo: Mi eĉ ne konas lin. Hodiaŭ li estas ĉi tie la unuan fojon.

Grafo: Kaj vi tiel brakumas kaj kisas lin?

Anjo: Jes.

Grafo: Malgraŭ via kapdoloro?

Anjo (*levas la ŝultrojn*): Kion mi faru? Li trinkas vinon.

Grafo: Ĉu tio estas tiel granda afero?

Anjo: Nu certe. La ceteraj trinkas bieron.

Grafo: Kiel vi diris antaŭe? Vi ŝatus resaniĝi, ĉu?

Anjo: Jes.

Grafo: Kion diris la kuracisto?

Anjo: Por kvar semajnoj mi bezonus forveturi. Banterapio, speciala nutrado, vakcinado. Kontraŭ anemio. Arseno kaj striknino. Kaj nekuir-

ita bovida hepato. Kaj ankaŭ mia sangopremo estas tre malalta.

Grafo: Diru, Anjo, kiel vi opinius pri tio, se mi nun forsendus vin por kvar semajnoj por resaniĝi.

Steĉjo: Brave, ekscelenco!

Grafo: Por kvar semajnoj, medicina traktado, banterapio, speciala nutrado, vakcinado, bovida hepato, bona aero kaj altigo de la sangopremo, do ĉio necesa.

Anjo (ektime): Ne ... Ne en hospitalon!

Grafo: Dio gardu min! Sed en bonan, agrablan sanatorion. Kie jam ankaŭ mi ripozis. (al Steĉjo) Mi pensas pri la sanatorio de d-ro Conrad en Unterbach, ĝi estas sufiĉe malproksime de ĉi tie kaj unuaranga loko.

Steĉjo: Agrabla loko. Tie oni ne akceptos ŝin.

Grafo: Ĉu post mia propono?

Steĉjo: Tio estas alia afero.

Anjo: Kiel vi povus proponi min?

Grafo: Tion konfidu al mi! Vi estas filino de antaŭ longe mortinta ŝipoficiro, ni diru kuzino de mia direktoro.

Steĉjo: De kiu direktoro?

Grafo: Mi ne havas direktoron. Kiel vi nomiĝas?

Anjo: Anjo.

Grafo: Kia Anjo?

Anjo: Anjo Paulovics.

Grafo: Ne bona. Vi nomiĝos Anna Paulino. Ĉu bone?

Anjo: Bone.

Grafo: Ripetu ĝin!

Anjo: Anna Paulino.

Grafo: Brave. Via patro estas forpasinta ŝipoficiro.

Anjo: Jes.

Grafo: Vi estas kuzino de mia direktoro.

Anjo: Tre volonte.

Grafo: Sed diru tion ankaŭ tie, sengene. La sanatorio estas mil kilometrojn for de ĉi tie, en Aŭstrio.

Anjo: Jes... Kaj... kaj kiam mi veturos?

Grafo: Ĉu vi havas iun, kiu, ni diru, bezonas pli longan adiaŭon?

Anjo: Ne.

Grafo: Tiam morgaŭ. Nun iru hejmen, matene vi anoncos vin ĉe mia sekretario en mia urba kontoro kaj morgaŭ vi veturos. Mi petas vin, Steĉjo, morgaŭ mi longe dormos, vi faru la aranĝojn frumatene.

Steĉjo: *Zu Befehl, Exzellenz!*²

Grafo (*al Steĉjo*): Poŝmono, fervoja bileto, telegramo kaj rekomendo al ĉefkuracisto d-ro Conrad en Unterbach, kiel mi ĵus diris, tagmeze mi subskribos ĝin. (*al Anjo*) Kaj vi ricevos paron da konvenaj roboj, burĝajn ŝtrumpojn, ne palpu ŝin, Karlo, ŝi estas jam damo, kaj vi *principessa*, ne aŭdacu tiel ŝminki vin en la sanatorio, ĉu vi komprenis min?

Anjo: Jes.

Grafo: Steĉjo, karulo, ĉion ĉi morgaŭ antaŭtagmeze.

Steĉjo: Kiel vi ordonas.

Grafo (*al Anjo*): Kaj jam morgaŭ: veturo. (*al Steĉjo*) La sanatorio sendu la semajnajn fakturojn al mia kontoro.

Steĉjo: Ĉio estos en ordo.

Grafo: Kiel vi nomiĝas?

Anjo: Anna Paulino.

Grafo: Brave. Kaj kiel vi diris, vi ne havas amaton.

Anjo: Dependas, kion vi nomas amato.

Grafo: Kiun vi koramas.

Anjo: Tian mi ne havas.

Grafo: Mi petas por kelkaj vortoj, kara s-ro ĉefo.

Posedanto (*alsaltas*): Bonvolu ordoni!

Grafo: Post kiam mi vidis, ke vi atentege subaŭskultis kaj aŭdis ĉiun vorton de tio, pri kio ni parolis, mi konsideras superflua ripeti la aferon. Do temas nur pri tio, ĉu vi donos kvarsemajnan forpermeson al Anjo?

Posedanto: Ekscelenco, ŝi havas kontrakton.

Grafo: Mi demandis ne tion, kion ŝi havas, sed ĉu vi donos al ŝi kvar semajnojn da forpermeso.

Posedanto: Ekscelenco, ŝi havas kontrakton.

² Kiel vi ordonas, ekscelenco! (germane)

Kelnero: Tio ne eblas, sinjoro, Tio estas ekskludita.

Posedanto: Nur por kontentigi vian moŝton. Sed...

Grafo: Sed?

Posedanto: Sed post kvar semajnoj ŝi devas reveni ĉi tien.

Grafo: Ja kompreneble. Tio estas nur libertagoj pro malsano.

Kelnero: Estas ekskludite.

Posedanto: Ŝi estas la apogo de mia modesta negoco, ekscelenca moŝto.

Grafo: Mi ja kredas. Kiu tiel bone traktas la vintrinkantajn gastojn! Steĉjo, bonvolu pagi. (*Stariĝas.*) Ek, ni iru!

Ĉiuj stariĝas. Steĉjo pagas al la kelnero.

Posedanto (*al Anjo*): Kisu la manon de la ekscelenca moŝto!

Anjo (*volas kisi lian manon.*)

Grafo (*retenas ŝin*): Ne, ne! (*Kisas ŝin sur la frunto.*) Prefere tiel.

Posedanto: Kaj morgaŭ iru al la ekscelenca moŝto, por danki lin por lia boneco.

Grafo: Eĉ iom ne! Pri kio vi parolas? Kiel vi aŭdacas diri ion tian? Anjo, eĉ ne pensu veni al mi. Ni ankaŭ ne akceptus vin. Mi neniam plu volas vidi vin. Kaj neniel miskomprenu min, kara mia. Eĉ iom ne kredu, ke vi plaĉas al mi. Vi ne plaĉas al mi. Mi mem plaĉas al mi. En ĉi tiu romantika rolo: fabela savanto, kiu venis, savis kaj malaperis. Ankaŭ mi estas nur vanta homo kiel aliaj, kaj la tuto kostas ne multe. Eĉ, kiom ĝi kostas, la dekoblo de tiom mi gajnis kartlude hodiaŭ nokte. Per unu piko du. (*Al la artomeblisto, kiu tiras la manon de Anjo.*) Lasu ŝin, la damo ne reiros, la damo estas malsana kaj forveturos, kaj cetere ŝi estas filino de ŝipoficiro kaj kuzino de mia direktoro. Ni iru, sinjoroj! (*La posedanto malfermas la pordon kun profunda riverenco.*) Bonan nokton!

*La tri sinjoroj foriras.
Kurteno*

DUA AKTO

Dua bildo

Parto de la konversacia salono de sanatorio. Maldekstre fone, sur la fona muro, kontraŭ la spektantoj estas larĝa vitropordo al restoracio. Dekstre kaj maldekstre, tute antaŭe libera spaco. Malantaŭe dekstre tri briĝtabloj. Antaŭe maldekstre, kontraŭ la spektantoj sofo. Dekstre de la sofo, tute proksime al ĝi brakseĝo, antaŭ kiu tre malgranda solitertableto. Ceteraj seĝoj kaj tabletoj ktp. La kvina horo posttagmeze.

Junio.

Malantaŭe du paroj de kartludantoj silente briĝas. Kelkaj kibicas starante, sidante. Inter ili asista kuracisto starante en blanka kitelo.

Sur la sofo en la antaŭspaco s-ino Pál, kvindek-sesjara, digna damo, legas libron. En la brakseĝo sidas Manjo, onklino de s-ino Pál, sepdek-kvinjara afabla maljunulino; dismetas soliterajn kartojn.

Kun ili estas Ruĉjo, filo de s-ino Pál, dudek-sesjara. Tie staras ankaŭ la ĉefkuracisto en blanka kitelo, pli aĝa, eleganta homo.

S-ino Pál (*kun libro en la mano*): Diru, doktoro, kiom da semajnoj mi restadas en la sanatorio, ĉar mi ne plu scias.

Kuracisto: La trian semajnon vi pasigas, altmoŝta sinjorino.

S-ino Pál: Kaj kiel longe mi restos?

Kuracisto: Ankoraŭ du semajnojn.

Manjo (*dismetante kartojn*): Terure!

Kuracisto: Ej nu, sinjorina moŝto. Ĉu vi volas ofendi min?

S-ino Pál: Mia onklino Manjo estas obstina diboĉulino, jes ja, diboĉulino, ŝi enuas en sanatorio, kvankam tio utilas al ŝi. Nu, kompreneble, nokte maldormi, kartludi, vizitadi dancvesperojn, tion ŝi ŝatas. Kvantam tio malutilas al ŝi. (*Plu legas.*)

Manjo: Ellernu jam fine, ke gustas nur tio, kio malutilas al ni. Hodiaŭ spit mi trinkos botelon da ĉampano!

Kuracisto: Sed vi ne ricevos!

Manjo: Ja pro tio mi diras tiel kuraĝe. (*Dismetas la kartojn.*) Kartludi! Vi eĉ pri ĉi tiu soliteraĵo diros, ke ĝi estas kartludo.

Ruĉjo (*al la kuracisto, kelkajn paŝojn for de la damoj*): Diru, s-ro

ĉefkuracisto... kaj Anjo... Anjo kiel longe devos resti?

Kuracisto: Mi preskaŭ atendis ĉi tiun demandon.

Ruĉjo: Nu ne... mi nur ĝuste...

Kuracisto: Mi scias, ja scias. F-ino Paulino jam ne „devus” resti ĉi tie. Ŝia kvarsemajna terapio jam delonge finiĝis. Ŝi estus povinta forveturi jam du semajnojn pli frue.

Ruĉjo: Kaj... kial ŝi ankoraŭ restas?

Kuracisto: Se tion ne vi demandus, karulo, mi dirus, ke mi ne scias.

Manjo (*sidanta pli for de ili, metante kartojn*): Jen vi ricevis, Ruĉjo, kion vi meritis!

S-ino Pál: Kion?

Manjo: Ĉu vi ne aŭdis, kion diris la doktoro al via filo?

S-ino Pál: Ne, mi ne.

Manjo (*metante kartojn*): Interese. Vi sidas tie kaj ne aŭdas. Kaj mi sidas ĉi tie kaj aŭdas. Tre interese. Aliaj maljunulinoj surdiĝas kun la tempo, kaj mi ĉiam pli bone aŭdas. (*Metas kartojn.*) Kvankam ne tro agrable.

S-ino Pál (*al la kuracisto*): Ĉu temas pri Anjo?

Kuracisto (*gestas jese.*)

S-ino Pál: Mi esperas, vi diris ne ion malbonan pri Anjo.

Kuracisto: Dio gardu min!

S-ino Pál: Ĉar tiam kun mi krucos spadon kun vi.

Manjo (*metante kartojn*): Kio ne estus tiel terura, sed ankaŭ kun mi vi krucus spadon, kaj de tio Dio mizerikorda gardu vin! Ruĉjo, ne rigardu daŭre tiel nervoze tiuflanken, ne zorgu, la anĝelo baldaŭ aperos. Ĝuste je la kvina, ĝis nun ŝi ĉiufoje estis akurata. Vi povus scii, ke ŝi nun promenas kun lia ekscelenco la admiralo.

Ruĉjo: Mi scias, onklino Manjo.

Manjo: Ĉu vi eble ĵaluzas la maljunan sinjoron?

S-ino Pál: Ba! Manjo!

Manjo: Nu, nu. Ne tiom tre „ba!” La emerita s-ro admiralo estas ja tre plaĉa, belstatura viro. Mi ankoraŭ ne emeritigus lin.

S-ino Pál: Nu, Manjo, la ŝtato ne estas tiom sensama kiel vi.

Kuracisto: Ej nu, altmoŝta sinjorino, kiel rigore vi bonvolas esti.

Anjo enpaŝas kun la admiralo. La emerita admiralo estas vestita civile, aĝas sesdek kvin ĝis sepdek jarojn, belstatura maljunulo.

Admiralo: Mi kisas viajn manojn.

Anjo: Mankison. (*Kisas la manon al s-ino Pál, kiu kisas ŝin. Ekiras al Manjo.*)

Manjo (*metante kartojn*): Saluton! Al mi vi ne bezonas kisi la manon, mi havas farendon, kaj cetere mi ne meritas tion, mi estas ja koruptiĝinta filino de la familio.

Anjo premas la manon de Ruĉjo.

S-ino Pál (*al la admiralo*): Longe vi promenis. Vi devis tre profundigi en la konversacio. (*Tiras Anjon al si, tenas ŝin brakumita.*)

Anjo: La s-ro admiralo parolis tre interese.

S-ino Pál: Pri kio?

Admiralo: Mi rakontis al ŝi detale, kiel vivas ŝipoficiroj en militŝipoj, sur la aperta maro. Lia karmemora patro estis ja ŝipoficiro, sed li ne povis rakonti al ŝi pri sia vivo, ĉar ŝi estis ankoraŭ bebo, kiam ŝi perdis sian patron. Kaj mi nun... iel-tiel... forigas ĉi tiun mankon. Mi esperas, tio ne estis teda.

Anjo: Kiel povas diri ion tian, via ekscelenca moŝto?

Admiralo: Mi rigardis ŝian vizaĝon, dum mi rakontis. Ĝi estis tre emociiga, larmetoj brilis en ŝiaj okuloj, ŝi tre atentis, kaj dume tute refariĝis infaneto... kia tiam ŝi devis esti, kiam ŝia patro ankoraŭ vivis. (*Paŝas al Manjo.*) Kio estas tio, ĉu denove solitero Napoleono?

Manjo (*rigardante daŭre la kartojn kaj dume transmetante kelkajn*): Via ekscelenca moŝto devus nun reveni de la promeno propre kun verda papilireto kaj kun verda ladskatolo.

Admiralo: Kial? Mi estas kolektanto de poŝtmarkoj, ne de papilioj. Ĉu vi kredas, ke koloraj poŝtmarkoj flugadas en la aero kiel papilioj?

Manjo: Ne, sed mi ĉiam tiel imagis emeritajn admiralojn. Tio konvenas al ili. Papilireto kaj iom da reŭmato.

Admiralo: Ĉi lastan, sinjorino, mi ja havas. Ĉu vere, s-ro doktoro?

Kuracisto: Ho, jes.

Manjo: Do mi estas iom trankviligita. (*Metas karton.*)

S-ino Pál (*al Anjo*): Kaj kie vi aventuradis en la ĉirkaŭaĵo?

Admiralo: En Unterbach oni ne multe povas aventuri.

Manjo (*metante karton*): Unterbach kiel metropolo. Vere mi ne scias, kial havas ĉi tiu nestaĉo nomon. Grandema afektado. Kelkaj kamparanaj domoj kaj unu fervoja stacio. Punkto.

Kuracisto: Nu kaj la sanatorio?

Manjo (*subtakse*): Nu, kaj la sanatorio.

Kuracisto (*al Anjo*): Se vi forestas, la atmosfero estas tuj pulvodora. Oni amas vin ĉi tie tiom, ke se vi ne ĉeestas, ĉiuj iĝas nervozaj.

Anjo: Mi venis akurate. Tempas la kvina.

Kuracisto: Mi timas, ke la altmoŝtaj sinjorinoj ne revenos al Unterbach, se vi ne estos ĉi tie. Kvankam jam la kvaran jaron ili honoras nin.

Manjo: Mi ne estas altmoŝta sinjorino. Mia fratineto... (*kapmontras al S-ino Pál*)... tiu estas altmoŝta sinjorino, ŝia edzo estis prefekto.

Kuracisto: Pardonon, nobelina moŝto!

Manjo: Eĉ pli malbona. Mi estas sinjorina moŝto. (*Al la admiralo, kiu volas preni karton.*) Kion vi volas?

Admiralo: Mi metus ĉi tien tiun keran reĝon.

Manjo: Mi ne metus ĝin tien. Mi ankaŭ ne metos ĝin. Kaj entute ne konsilu, ĉar mi perdos la partion, kaj mi ne volas perdi ĝin, ĝi ne estas marbatalo.

Admiralo: Vi estas vere afabla. Dankon.

Manjo: Volonte.

S-ino Pál (*al Anjo*): Kaj filino mia, kial vi estas nun tiel silentema?

Anjo (*ridetas.*)

Manjo (*metante siajn kartojn*): Pardonon. Mia filino.

Anjo (*ridas.*)

S-ino Pál: Kies filino vi estas?

Anjo: La via. (*Kisas ŝian manon.*)

Admiralo: Kio? Ĉu pri ŝia patro vi eĉ ne demandas? Kiu estas via patro, Anjo?

Anjo (*ridante*): Vi.

S-ino Pál: Pardonon, pardonon! Pri tio eble ankaŭ mi havas vorton.

Manjo: Mi adoptus ŝin. (*Metas karton.*)

Admiralo (*kisas la manon de Manjo*): Dankon, pri tio mi estas fiera. La marbatalo estas pardonita.

Kuracisto: Ameno pri la paco. Mi povas trankvile foriri. Ĝis revido! (*Foriras.*)

Manjo (*metante karton*): Filino mia Anjo, diru, sed sincere, ĉu vi amas ĉi tiun doktoron?

Anjo: Ho, jes.

Manjo: Mi ne. (*Metas karton.*)

Paŭzo.

S-ino Pál: Nu, nun kion ni faru? Ĉiun posttagmezon ĉi-tempe starigas ĉi tiu grava demando.

Anjo: Rakontu!

S-ino Pál: Ĉu denove mi rakontu?

Anjo: Rakontu ĉiufoje! Neniu scipovas tiel bele rakonti.

S-ino Pál: Pri kio mi rakontu?

Anjo: Pri kio hieraŭ. Ĉiam pri la samo. Pri la domo, loĝejo, pri la ĝardeno, la hundeto. Pri ĉi tiu hundeto. (*Montras foton.*)

S-ino Pál: Kio, ĉu vi kunportas la portreton de nia hundeto?

Anjo: Mi ricevis ĝin de Ruĉjo. (*Rigardas ĝin.*) Mi amegas ĉi tiun hundeton. (*Remetas ĝin.*) Rakontu!

S-ino Pál: Sed tion vi jam almenaŭ dek-kvinfoje igis min rakonti.

Anjo: Ne gravas. Vi diras ĉiufoje ion novan. Rakontu pri ĝi ankaŭ dek-sesafoje!

S-ino Pál: Kiel infaneto. Ŝi volas aŭdi ĉiufoje la saman fabelon, ĉar ŝi alikutimiĝis.

Anjo: Ĉar mi ŝatas ĝin.

S-ino Pál: Do... kie mi komencu?

Admiralo: Mi iras rigardi la briĝantojn, mil pardonojn, sed mi jam aŭdis ĝin multfoje, scias ĝin parkere.

Manjo (*metante karton*): Reciti!

Admiralo (*flue recitas ĝin kiel lecionon*): „Malantaŭ la kastelo troviĝas malgranda budo el ferbetono, en ĝi brediĝas silkoraŭpoj, post ĝi situas la kokinbredejo, kiun estras onjo Manjo, 346 pecoj da korto-

birdoj, inter ili 43 Orpington, 119 arĝentaj bantamoj, 45 Plymouth kaj 30 Minorka. Meze staras kvar morusoj, unu blanka kaj tri ruĝaj, la kokinoj manĝas la berojn, kaj la silkoraŭpoj la foliojn.”

Manjo: Noto plej bona. Vi povas sidiĝi.

Admiralo: Dankon. (*Iras al la briĝantoj, sidiĝas por kibici.*)

S-ino Pál: Kaj post la kokinkorto troviĝas eta fruktoĝardeno...

Anjo: Persikarboj.

S-ino Pál: Ĝuste. Plue staras bele verda lignobarilo kaj meze de la ĝardeno, sub la arboj staras la dometo de Ruĉjo. Sed Ruĉjo ne loĝas en ĝi, li nun ankoraŭ loĝas ĉe ni en la granda domo, li transloĝiĝos en la dometon, se li edziĝos. Kune kun lia edzino.

Ruĉjo: Se mia edzino volos tion.

S-ino Pál: Nu, tio mankus, ke ŝi ne volas! Mi origine ne permesas, ke vi prenu tian knabinon, kiu ne volas loĝi en la dometo. Mi ja reordigos vian kapon!

Anjo: Bonvolu rakonti plu! Sur kvin ŝtupoj supren, sekvas antaŭĉambreto, poste la salono.

S-ino Pál: Ĝuste. El ĝi malfermiĝas ĉambro kun verando, la flava ĉambro.

Anjo: Ne. Ne flava. Se bluaj kurtenoj pendas en ĝi.

S-ino Pál: Vidu, ŝi pravas. Ŝi pli bone scias ol mi. Kompreneble, blua. La salono estas flava. Tiu estas la sidĉambro. Ĝi estas malhele blua.

Anjo: En ĝi pendas la granda portreto de Ruĉjo.

S-ino Pál: En vivogrande, el lia trijara aĝo. Vi surpriziĝus, se vi vidus ĝin, ĉar ŝi estas precize tia en ĝi kiel nun.

Ruĉjo: Nu, iom da diferenco tamen videblas.

S-ino Pál: Por vi jes, sed ne por via patrino.

Anjo: Bonvolu rakonti plu!

S-ino Pál: Ej nu, kiel senpacienca vi estas. Ne urĝu min! Tiel mi konfuzos la kurtenojn. Kaj cetere, ĉiufoje rakontas mi pri mi, pri ni. Vi neniam parolas pri vi. Vidu, mi ne scias, de kiu koloro estas la kurtenoj ĉe vi. Neniam vi rakontas pri tio, kia estas la vivo ĉe vi en Triesto.

Anjo: Nu... Dio mia! (*Silentiĝas.*)

S-ino Pál: Mi scias nenion pri via ĉambro. Kvankam vi estas mia filino, tiel senvide mi imagas, ke vi havas tre simplan, pure blankan knabinĉambron.

Anjo: Blankan.

S-ino Pál: Kurteno, litkovrilo, ĉio?

Anjo: La kurteno estas... hele blua. Kaj la litkovrilo... ankaŭ tiu.

S-ino Pál: Ĉu la meblaro estas blanka?

Anjo: Ĉu la meblaro? Blanka.

S-ino Pál: Ĉu lakita?

Anjo: Ne. Nur simple blanke farbita.

S-ino Pál: Kaj la ĉambro de via patrino? Kiom da ĉambroj ŝi havas?

Anjo: Du. Dormoĉambron kaj etan salonon.

S-ino Pál: Dum via patro vivis, vi havis, kompreneble, pli grandan loĝejon.

Anjo: Je unu ĉambro pli grandan.

S-ino Pál: Nu jes. Li restadis malofte hejme. Daŭre sur la maro. Tial estas terura la vivo de tia ŝipoficiro. Se mi havus filinon, neniam mi edzinigus ŝin al ŝipoficiro. Tio egalas daŭran vidvinecon. Via patrino devis tre ami vian patron, ke ŝi edziniĝis al li.

Anjo (*komenças plori.*)

S-ino Pál: Nu, filineto. (*Brakumas ŝin.*)

Manjo (*metante kartojn*): Pli bone estus, se vi ne plorigus la kompatindulinon, vi devus scii, ke ŝia malsano estas ĝuste tio, ke ŝi facile ekploras.

S-ino Pál: Bone, bone, filineto, retrankviliĝu! Manjo pravus. Ni parolos pri io alia. (*Reciprokas la saluton de Georgi, enpaŝanta malantaŭ ili kaj salutanta.*) Bonan vesperon!

Georgi (*promenas malrapide al la briĝantoj, starante kibicas.*)

Manjo (*metante kartojn*): Li estas la nova gasto. Li venis hodiaŭ, frumatene. Kun granda flava kofro. Eĉ imagon mi ne havas, kiu, kio li estas.

S-ino Pál: Speco de inĝeniero.

Ruĉjo: Li nomiĝas Georgi. Inĝeniero Georgi el Triesto.

S-ino Pál: Ĉu el Triesto? (*al Anjo*) Ĉu vi konas lin?

Anjo: Ne.

Manjo: Triesto estas granda urbo.

Ruĉjo: Kun ducentkvindek mil loĝantoj.

S-ino Pál: Ĉu ankaŭ tion vi scias?

Ruĉjo: Kiam ni konatiĝis kun Anjo, mi konsultis la enciklopedion ĉi tie, en la biblioteko, dum pluvis.

S-ino Pál (*rigardas al Georgi, kiu staras dorse, ne tro for de ili*): Ne tre simpatia homo.

Manjo: Oni ne juĝu laŭ la vizaĝo.

S-ino Pál: Oni juĝu nur laŭ ĝi. (*al Anjo*) Al vi kiel plaĉas via sampa-trujano?

Anjo: Min faras nervoza lia rigardo. Sed kial vi ĉesis rakonti? Blua ĉambro, flava ĉambro, poste la dormoĉambro...

S-ino Pál: La du dormoĉambroj. Rilate tion mi estas moderna, se rilate nenion alian. Edzo kaj edzino dormu aparte en propra dormoĉambro. Tio estas tre saĝa inventaĵo. Oni ne dormu kun sia edzo en unu ĉambro. Aparta ĉambro estas pli bona.

Manjo (*metante kartojn*): Aparta urbo estas la plej bona.

S-ino Pál: Daŭra, ĉiama kunesto kondukas al nenio bona. Ankaŭ la familio ne pendu daŭre reciproke sur la kolo. Mi estus aranĝiginta por Ruĉjo komfortan loĝejon en la granda domo por la okazo, se li edziĝos, sed mi volas, ke ili loĝu aparte. Aparta domo, aparta ĝardeno.

Anjo: Ĉu ankaŭ aparta hundeto?

S-ino Pál: Tio dependas de la nova edzino. Se ŝi amos la hundeton, tiam aparta ĝardeno sed kun komuna hundouzo.

Ruĉjo: Mi, male, pensas, revas pri tio, ke en la unua jaro mi veturigis ŝin al Parizo kaj Londono, por vidi la pli vastan mondon... al la Operejo... al ambasadaĵ vesperoj... brilaj amuzejoj.

*Enpaŝas tri pli aĝaj sanatoriaj loĝantoj kaj sidiĝas ĉe la tria briĝotablo.
Du sinjoroj kaj unu sinjorino.*

Anjo: Ne, ne, kiel vi povas diri ion tian? Kia feliĉo devos esti... por tiu edzino kun ĉi du karegaj... orkorulinoj... vespermanĝi kune en la ĝardeno, trankvile, silente... aŭ vintre post vespermanĝo silente kart-

ludi apud la kahela forno... kaj kuŝiĝi tre frue..., neniel sidadi en noktaj lokaloj, en fumo, bruo, kie oni frapas tamburojn kaj trinkas konjakon... kaj duonnudaj virinoj saltadas...

S-ino Pál: Fi...

Asista kuracisto (*kiu ĝis nun starante kibicis ĉe la briĝantoj, nun pasas al s-ino Pál*): Altmoŝta sinjorino...

S-ino Pál (*rigardas al la tri novvenintoj*): Alvenis miaj partneroj. Kiel mi eklaboru?

Asista kuracisto: Vi estas petata.

S-ino Pál (*stariĝas, al Ruĉjo*): Ni daŭrigos pri tio post la vespermanĝo, tiam mi respondos al vi pri viaj revoj. Ne lasu min forgesi, filino, ni ĉesis tie, ke li ne volas loĝi kun sia edzino ĉe sia patrino, sed veturos al Parizo, Londono. (*Iras al la briĝantoj kaj sidiĝas. La asista kuracisto sekvas ŝin.*)

Ruĉjo (*sidiĝas loke de sia patrino sur la sofo apud Anjo*): Ĉi tiu demando estas la plej tikla punkto de mia patrino.

Anjo: Mi povas kompreni.

Paŭzo.

Ruĉjo: Patrino estas en pluraj rilatoj, por tiel diri, obstina.

Anjo: Certe ŝi volas por vi nur bonon.

Paŭzo.

Ruĉjo: Mi proponus, ke ni eliru iom promeni, sed estas tre malvarme.

Anjo: Jes, la vetero malvarmiĝis.

Paŭzo.

Ruĉjo: La indikilo de la barometro multe falis hodiaŭ post tagmezo. La barometro nome...

Manjo (*stariĝas*): Vi nun kredas, ke mi stariĝas, ĉar la solitero estas komponita. Eksciu do, ke ĝi ne estas komponita, sed mi ĉesas kaj foriras de vi, por ke vi restu solaj. Tiun aludon pri la vetero mi ankoraŭ glutis. Sed kiam sekvis la barometro, tion mi jam tute klare komprenis. Mi iras. Bone, bone, mi iras. (*Ekiras.*) Mi iras kibici al via patrino.

Anjo: Sed onjo Manjo! (*Stariĝas.*)

Ruĉjo: Lasu ŝin iri!

Manjo: Residiĝu sur via loko! Ne zorgu, baldaŭ mi revenos, mi ja ne povas longe rigardi, kiel malbone ŝi ludas. (*Iras al la briĝantoj, kie oni donas al ŝi seĝon. Kibicas al s-ino Pál.*)

Anjo (*residiĝas. Mallaŭte*): Mi trovis bileton kun via peto, ke vi volas nepre paroli kun mi.

Ruĉjo: Jes.

Anjo: Do... mi estas ĉi tie.

Ruĉjo: Estis malsaĝe deflanke de mi skribi bileton. Sed mi ne povis retenigi min. Mi estis tre nervoza. Mi ĵaluzas.

Anjo: Ĉu pri la admiralo?

Ruĉjo: Eĉ iom ne.

Anjo: Do?

Ruĉjo: Pri la poŝtoficisto.

Anjo (*embarasite*): Kio?

Ruĉjo: Ĝis nun mi ne parolis.

Anjo: Vi ja ne havis kaŭzon por tio. Nek ankaŭ nun.

Ruĉjo: Mi havas kaŭzon.

Anjo: Mi ne donis kaŭzon por tio.

Ruĉjo: Daŭre vi vizitas la poŝtoficejon.

Anjo: Nu kaj?

Ruĉjo: La poŝtoficisto estas... plaĉa juna homo.

Anjo: Ba!...

Ruĉjo: Oni diras, li enamiĝis al vi.

Anjo: Kiuj diras?

Ruĉjo: Kiuj vidis vin ĉe li en la poŝtoficejo. Vi restas tie duonhorojn.

Anjo: Ridinde.

Ruĉjo: Kion preparolindan vi havas... tra duonhoroj? Kiu vidis vin kune, ĉiuj diras, ke la poŝtoficisto estas tiom enamiĝinta al vi, ke eĉ vidi tion estas malbone. Mi ne sciis tion. Ĉu tio estas vera?

Anjo: Ankaŭ se estas tiel, mi ne kulpas pri.

Ruĉjo: Se estas tiel, vi ne devus tiel ofte aliradi. Estas nenia neceso iri ĉiutage al la poŝtoficejo.

Anjo: Kiel vi scias, ke estas nenia neceso? Kiel vi scias, kial mi havas

tiom da farendoj en la poŝtoficejo? Kiel vi scias, ke ne ĝuste pro vi mi vizitadas ĉiutage la poŝtoficejon?

Ruĉjo: Ĉu pro mi?

Anjo (*nervoze, maltrankvile*): Jam du semajnojn pli frue mi devus forveturi. Oni sendis min por kvar semajnoj. Kaj nun mi jam restadas ĉi tie la sesan semajnon. Mi ĉiutage telegrafas kaj atendas respondon kaj petegas telefone, ke oni ne forsendu min de ĉi tie. Mi ne volas foriri de ĉi tie, estas ja kompreneble, kiu komprenus tion, se ne vi.

Ruĉjo: Kora mia... mia karega...

Anjo: Mia patrino... mia patrino estas malriĉa vidvino, vi scias, ke ni ne povas vivteni nin el la malgranda pensio de mia patro... grafo Arma-ila faris al mia onklo la komplezon, sendi min ĉi tien... proprakoste... la grafo estas ne nur ĉefo de mia onklo sed ankaŭ lia amiko... sed misuzi lian bonecon ne eblas. Tion mia patrino ne toleras. Ŝi estas multe pli fiera ol fari tion.

Ruĉjo: Ĉu ŝi ne lasas, ke vi restu ĉi tie?

Anjo: Ne. Severe ŝi respondis, ke la kvar semajnoj forpasis, mi tuj veturu hejmen. Kaj mi prokrastadas, provadas, sed patrino ne cedas. Miaj nervoj ne pli eltenas ĉi tiun lukton, daŭre telegrafi, telefoni, ke almenaŭ ankoraŭ unu semajnon, ankoraŭ unu tagon mi povu resti, kaj vi aldone koleras min pro tio, ke mi tro ofte vizitas la poŝtoficejon.

Ruĉjo: Koreto mia... ĉu vi povas pardoni min?

Anjo: Vi neniam, neniam ekscios, kiom mi luktas kaj suferas en ĉi tiuj tagoj por ĉiu minuto, nur por ne ŝiriĝi de vi. Ĉar se oni forveturigis min, mi neniam povos revidi vin.

Ruĉjo: Ĉu neniam vi povos revidi min? Foje vi jam diris tion. Mi devas kredi, ke vi ion sekretas antaŭ mi. Anjo... kiam lastafoje vi menciis tion, mi pensis pri tio... ke via patrino, viaj protektantoj... ke hejme oni volas edzinigi vin al aliulo. Konfesu, Anjo! Eldiru!

Anjo (*turmentita*): Ne konfesigu min!

Ruĉjo: Anjo, mi ne povas vivi sen vi. Mi ne volas vivi sen vi.

Anjo (*mallaŭte*): Vi vivos sen mi. Sed mi ne sen vi.

Ruĉjo: Kun vi... en tiu eta domo. Mia patrino, kiu estas tiel kruele elektema, kiam temas pri mi, mia patrino... adoras vin.

Anjo: Mi same... amegas ŝin!

Paŭzo. Ruĉjo prenas la manojn de Anjo.

Ruĉjo: Kiel varmegaj estas viaj manoj!

Anjo: Se vi nur tuŝas ilin... jam...

Ruĉjo (*subvoĉe, erotike*): Vi estas varmega, sovaĝa, senbrida, ner-voza, brulanta... se ni estas duope... mi preskaŭ ekflamas apud vi. Kaj en societo, antaŭ aliuloj... vi estas milda, pudora, serioza, saĝa, ĝuste kondukanta... (*Ravite rigardas ŝin.*)... perfekta...

Anjo: Mi ne scipovas laŭdi vin tiel bele. Tion kapablas viroj... tiel bone. Foje diris al mi viro, ke por vi, viroj estas sensa plezuro laŭdi per belaj vortoj virinon, kiun vi amas. (*subvoĉe, kun retenita erotiko*) Mi, se mi sopiras al vi... kiam mi estas sola... mi scipovas diri nur la plej simplajn vortojn... sense trasenti vin... ekzemple mi diras tiel mallongajn, intimajn vortojn kiel „ĉe vi”... „la via”... „kun vi”... „en vi”... „al vi”... „vin”... „por vi”... Mi ripetas ilin mallaŭte, plurfoje, kun fermitaj okuloj kaj fine mi forte trasentas vin, tiufoje... kiel mi diru... mi tute transfandiĝas en vin... kaj tiam mi sentas min en vi... mi etendiĝas en vi kiel via sango... en vi mi brulas kvazaŭ mi estus via febro... ĉu vi komprenas tion? Tiel stultaj vortoj estas „en vi”... se mi ne scias pli taŭgan por tio... kaj... mi ne scias, ĉu mi scipovis esprimi, kion mi volis... eble estus pli bone diri simple, ke mi adoras vin.

Ruĉjo (*mallaŭte, ravite*): Koro mia...

Promenante enue, Georgi venas proksime al ili, haltas ĉe la solitera tableto kaj observas la dismetitajn kartojn.

Ruĉjo (*iom retiriĝante de Anjo; pro Georgi komencas paroli pri io alia*): Ĉu la fraŭlino venos matene tenisi?

Anjo (*ĵetas rigardon al Georgi, poste respondas*): Tre volonte. Sed ne tro frue.

Ili intence silentas.

Ruĉjo: Je la oka horo... ĉu tro frue?

Anjo: Prefere je la naŭa.

Ili intence silentas.

Ruĉjo: Se ne pluvos.

Anjo: Ja ĝuste tiam.

Ili intence silentas.

Manjo (*revenas; al Georgi*): Mi petas vin, neniel tuŝu mian ludon, mi ankoraŭ daŭrigos ĝin.

Georgi: Dio gardu min, sinjorino. Mi nur rigardas, kiel statas la ludo.

Manjo: Ankaŭ tio ne estas bona. Mi ne ŝatas, se oni rigardas ĝin, ĉar vi misserĉas ĝin, kaj ĝi ne kunmetiĝos. Ĝi estas por mi speco de talismano. Ĉu vi scias, kio estas talismano?

Georgi: Mi scias.

Manjo: Nu do, tiam foriru de ĉi tiu tablo! Iru do, foriru, kaj ne aŭdacu veni proksimen al ĝi! (*Milde forŝovas lin.*)

Georgi (*ridante*): Kiel vi ordonas, sinjorino. (*Ekiras malantaŭen.*)

Manjo (*al Ruĉjo*): Nu? Kiu amas vin? (*Foriras kun Georgi.*)

Ruĉjo: Karega Manjo.

Anjo: Ĉi tiu homo nervozigas min per sia rigardo.

Ruĉjo: Ĉu vi pardonis min, koreto mia?

Anjo: Ba, vi ja ne ofendis min.

Ruĉjo: Mi estis ĵaluza.

Anjo: Pri tio mi estas nur fiera.

Ruĉjo: Kaj ne estas mirinde, se ĉiu viro enamiĝas al vi. Nun mi estas tiom feliĉa!

Anjo: Kaj se oni forveturigis min?

Ruĉjo: Mi veturos post vi.

Anjo: Ne eblas.

Ruĉjo: Jam denove? Se vi amus min, tiam...

Anjo: Se vi foje ekscios, kiom Anjo amis vin..., kiom Anjo... amis vian patrilon... kaj Manjon... kaj tiun etan domon... kaj la ĝardenon... kaj la verdan barilon... kaj tiujn kvar morusojn... kaj la bluan kurtenon... se foje vi ekscios... (*Luktas kontraŭ ekploro, sed ne ploras. Implikiĝas.*)

Ruĉjo: Mi ne komprenas: „Se mi foje ekscios.” Kio estas tio? Kial vi

estas tiom afliktita? Ĉi tie... kaŝiĝas ia sekreto, ĉu?

Anjo: Estas ja nenio alia en la mondo... sole nuraj sekretoj.

Fratino Elinjo enpaŝas.

Elinjo: F-ino Paulino, koreto mia, estas la kvina kaj duono.

Anjo (*leviĝas*): Mi venas, kara fr-ino Elinjo. Ruĉjo, ĉu vi restos ĉi tie en la salono?

Ruĉjo (*leviĝas*): Jes. Ĉu vi revenos?

Anjo: Jes, nepre. Kion vi faros ĝis tiam?

Ruĉjo: Nu, kion oni povus fari ĉi tie. Mi iros kibici al patrino. Ĝis revido! (*Iras al sia patrino kaj sidiĝas, dorse al Anjo.*)

Elinjo: Se vi volas resti, karega, mi povos veni ankaŭ post duonhor.

Anjo: Ne, estas pli bone esti pli frue post ĝi.

Georgi (*kiu pasumis proksime, nun paŝas al Anjo*): Pardonu, fraŭlino... ĉu vi permesas por momento?

Anjo: Bonvolu!

Fr-ino Elinjo retiriĝas flanken kaj atendas.

Georgi: Mi estas inĝeniero Georgi el Triesto.

Anjo: Mi havas la feliĉon.

Georgi: Bonvolu diri... ĉu mi ne konas vin?

Anjo: Ne.

Georgi: Tamen... mi kredas, ke jes.

Anjo: Mise vi kredas.

Georgi: Ĉu mi vere ne konas vin?

Anjo: Ne.

Georgi: Ĉu mi ankaŭ ne povas koni vin?

Anjo: Ne, ne.

Georgi: Mi vidis vin ie, eĉ mi parolis kun vi, mi nur ne scias, kie, jam la tutan tagon mi streĉas mian menson, sed mi ne rememoras.

Anjo: Ne, ne. Ekskludite.

Georgi: Sed tute certe.

Anjo: Ne eblas.

Georgi: Morgaŭ mi ekmemoros.

Anjo: Vi ne ekmemoros, ĉar mi neniam vidis vin.

Georgi: En Triesto.

Anjo: Ne, ne. Ni loĝas ekster la urbo, kaj mi... neniam, neniam eniras la urbon.

Georgi: Estas ekskludite, ke mi eraras.

Anjo (*tre nervoze*): Sed propre... kion vi volas de mi?

Georgi: Nenion... nur...

Anjo: Kion vi volas de mi? (*Ekploras.*)

Georgi: Pardonu min, mi nur...

Anjo (*plorante*): Mi petas vin, lasu min en paco! (*Skuata de ploro, fortunlas sin de li, du paŝojn ankaŭ foriĝas.*)

Elinjo (*reiras al Anjo; riproĉe al Georgi*): Ej nu, bonvolu ĉesi! (*al Anjo*) Venu, karulino! (*Elkondukas ŝin.*)

Manjo, kiu atentis, stariĝas, paŝas al Georgi, kiu fikse rigardas post Anjo.

Georgi: Nenio... altmoŝta sinjorino... nenio... (*Rigardas refoje post Anjo.*)

La scenejo mallumiĝas.

Tria bildo

Konsultejo de la ĉefkuracisto. Du pordoj. Unu horon post la antaŭa bildo.

La ĉefkuracisto en blanka kitelo ĵus finis interparolon kun Georgi.

Georgi: Proksimume tiel statas la afero. Dank' al Dio, ke mi ekmemoris. Ĉar antaŭ nelonge, kiam tiu asistantino alkiis min kun fulmantaj okuloj... kaj la maljuna damo respondecigis min, mi konfesas, mi ektimis. Sed tiel mi estas senkulpigita, almenaŭ de la s-ro doktoro. Alie mi tre hontus.

Kuracisto: Mi tre dankas vin, s-ro ĉefinĝeniero. Kaj nun mi ankoraŭ havas al vi nur unu demandon. Eble la plej tikan.

Georgi: Bonvolu!

Kuracisto: Ĉu vi permesas, ke mi sciigu tion, kion vi ĵus rakontis, al f-ino Paulino, kaj post kiam mi estos aŭskultinta ŝin, mi povu fari sur tiu bazo disponojn, kiajn mi vidos necesaj?

Georgi: Kompreneble. Mi petas vin, ankaŭ pro tio, ke mi ne restu en honto antaŭ la damoj, kiel iu, mi ne scias...

Kuracisto: Jes, bone. (*Stariĝas*) Do aranĝite... Mi tre dankas, ke vi venis ĉi tien kaj ĉion ĉi rakontis al mi. Ne prenu ĉikano, ke mi petis vin veni ĉi tien, sed oni anoncis al mi tiun ĝenan sceneton, kaj finfine sur ĉi tiu ŝipo la kapitano estas mi ... kaj mi kredas, mi ne bezonas diri, la kerno de la afero estas vere grava por mi kaj por ĉi tiu instituto Ankoraŭfoje: mi tre dankas vin.

Georgi: Volonte farite.

Kuracisto: Se venus la okazo, kaj vi bonvolus ripeti ĉion ĉi ankaŭ en la ĉeesto de f-ino Paulino...

Georgi: Sinjoro, mi staras je via dispono. Nun mi jam estas inkludita, mi ne retretas.

Kuracisto: Kie mi trovos vin, se eventuale mi bezonus vin?

Georgi: Nun mi iros en la salonon plu briĝi, kiam ajn vi deziras, sendu iun por mi.

Kuracisto: Mi tre dankas vin. (*al la ekiranta Georgi*) Pardonon, bonvolu ne tiuflanken, tie f-ino Paulino atendas ekstere. Prefere ĉi-flanken, tra ĉi tiu pordo.

Georgi foriras.

Kuracisto (*skuas sonorileton sur la tablo.*)

Servisto (*enpaŝas.*)

Kuracisto: Mi petas enveni f-inon Paulino.

La servisto eliras kaj enlasas Anjon. Anjo enpaŝas, post ŝi fr-ino Elinjo.

Kuracisto: Bonvolu sidiĝi. Fr-ino Elinjo, mi ne petis vin veni.

Anjo: Sen fr-ino Elinjo mi ne restos ĉi tie.

Kuracisto: Kiel... ĉu vi ne restos ĉi tie?

Anjo: Fr-ino Elinjo ĉeestis, kiam tiu sinjoro tiel krude atakis min, ŝi aŭdis ĉion, mi volas, ke ŝi ĉeestu, se temas pri tio. Kaj cetere mi ne povas resti ĉi tie sen fr-ino Elinjo.

Kuracisto: Povas esti, ke vi ne havas sekretojn antaŭ fr-ino Elinjo, sed mi havas.

Anjo (*stariĝas*): Se ŝi eliros, ankaŭ mi eliros.

Kuracisto (*kapitulacas*): Kiel vi volas. Mi ĉiuokaze atentigis vin. Bonvolu sidiĝi!

Anjo sidiĝas, ankaŭ la kuracisto. Elinjo restas staranta.

Kuracisto: Kara fraŭlino, antaŭ nelonge okazis mallonga sed ĝena sceno en la salono.

Anjo (*ekscitite*): Tiu sinjoro tiel krude atakis min, ke mi vere kredis...

Kuracisto (*interrompas ŝin*): Mi petas vin, kara, bonvolu ne eksciti vin, nenia bezono por tio. Ni parolu bele trankvile; havu fidon al mi! Ja ankaŭ ĝis nun vi honoris min per via fido, kaj mi flatas min per tio, ke vi eble iom eĉ ekamis vin.

Anjo: Mi tre ekamis vin. Vi rilatis al mi kiel bona patro. Se mi pensas pri tio, ke ĉi tiu homo...

Elinjo (*ekscitite*): Ataki malfortan, malsanecan damon en la salono, antaŭ ĉiuj, kvazaŭ enketa juĝisto...

Kuracisto: Fr-ino Elinjo, mi petas vin ne interveni. Mi estas trudita toleri, ke vi ĉeestas, sed deklarojn mi ne petas.

Anjo: Sinjoro, ne valoras perdi tiom da vortoj pri la afero. Eble mi estis tre nervoza, povas esti, ke ankaŭ mi kulpas. Se konsideri ĉion, tiu sinjoro diris nenion tian, kio povus ofendi min.

Kuracisto: Se tiel, kial vi do esploris?

Anjo: Ĉar... klare mi respondis al li, kaj li tamen plu konfesis min en tiel ofenda tono... mi hontis pro tiu konfeso antaŭ la familio Pál... ĉiuj povis aŭdi: s-ino Pál, onjo Manjo, Rudolfo... Oni povus kredi, ke Dio scias...

Kuracisto: Vidu, ni estu laŭeble plej rapide trans tiu afero. S-ro ĉef-inĝeniero Georgi ĵus foriris de mi. Mi nome petis la s-ron ĉefinĝeniero veni ĉi tien, por ke li donu klarigon pri la sceno. (*Anjo tre atentis.*) La s-ro ĉefinĝeniero bonvolis doni komplezan kaj tute kontentigan klarigon.

Anjo: Laŭ kiu...

Kuracisto: Refoje mi rekomendas al vi, f-ino Paulino, daŭrigi ĉi tiun interparolon inter kvar okuloj.

Anjo (*tre trankvile*): Se fr-ino Elinjo eliros, ankaŭ mi eliros.

Kuracisto: Kiel vi volas. (*post paŭzeto*) S-ro ĉefinĝeniero Georgi asertas, ke li konas vin el Triesto.

Anjo: Tio ne estas vera.

Kuracisto: Li decide asertas tion.

Anjo: Tio ne estas vera. Kaj kia aserto estas, ke li konas min, sed ne scias, kie li vidis min, kaj ke certe li konas min, sed ne memoras, kaj simile. La s-ro inĝeniero mensogas. Dio scias, kion li volas de mi. Se la s-ro inĝeniero...

Kuracisto: Ni haltu por momento. Diru f-ino Paulino, kial estas tiel indignige, ke la s-ro ĉefinĝeniero asertas koni vin? Kial ni ĉiuj estas tiel nervozaj pro ĉi tiu problemoj?

Anjo: Ĉar eĉ trifoje mi diris al li, ke neniam en mia vivo mi vidis lin, kaj li ĉiam pli obstine asertas, ke jes ja, li konas min, kvazaŭ mi mensogus.

Elinjo: Li kondukis rekte tiel, kvazaŭ f-ino Paulino volus nei la konatecon.

Kuracisto: Nu, finfine iu eldiris tion. Nu jes, ĉefinĝeniero Georgi nun jam decide asertas, ke la fraŭlino volas nei ĉi tiun konatecon, nome pro tio, ke la fraŭlino havas tre seriozan kaŭzon malkonfesi ĉi tiun konatecon. (*post paŭzeto*) Ĉefinĝeniero Georgi asertas, ke antaŭ jaro kaj duono en Triesto, en la haveno, kien li trafis frumatene, post tradiboĉita nokto kun siaj amikoj, li renkontis f-inon Paulino en tavernaĉo, en plej subnivela nokta dancamuzejo.

Anjo: Li mensogas.

Kuracisto: Laŭ lia aserto, kiun li nun jam konfirmas kun la plej granda decidemo, f-ino Paulino estis tiam dungito, dancistino, tiel nomata „animiga damo” de tiu nokta lokalaĉo, kie vi sidigis de unu tablo al la alia, inter maristoj kaj ceteraj ebriaj homoj, kaj ankaŭ vi estis drinkinta. (*Atendas la respondon.*)

Anjo: Bonvolu diri plu.

Kuracisto: Post alvoko elde la societo de la ĉefinĝeniero f-ino Paulino transsidigis ankaŭ al ilia tablo kaj trinkis kun ili. Laŭ lia aserto, kaj tion li klarigas per la ebrieco de la fraŭlino, vi kondukis senbride, brak-

umadis la membrojn de la societo, partoprenis en iliaj obscenaj ŝercoj, kaj fine la pli malgrandajn bankbiletojn, kiujn vi ricevis, vi akceptis. Ankaŭ la ĉefinĝeniero Georgi donis al vi kelkajn arĝentajn monerojn, por kiuj f-ino Paŭlino dankeme kisis lin.

Anjo: Diru ankaŭ, ke mi dormis kun li.

Kuracisto: Laŭ s-ro ĉefinĝeniero Georgi ĉi lasta fiaskis nur pro tio, ke s-ro Georgi rifuzis la rilatan proponon. Dufoje mi provis diri ĉion ĉi al vi inter kvar okuloj, sed vi malebligis tion por mi.

Elinjo: La plej lasta fiaĵo deflanke de viro, kalumnii bondevenan junulinon, ĝuantan ĉi tie ĝeneralan respekton, per tiel harstarigaj afe-roj, se li ne certe rememoras ilin... ja li mem asertas, ke li ne scias, kie li vidis ŝin... kaj se li ne scias...

Kuracisto: Post tio enmemoriĝis al li precize la loko, la tempo, la tuta historio de tiu nokto, ĝi okazis ja antaŭ longe, kaj kiel la s-ro ĉefin-ĝeniero asertas, en tiu tradiboĉita nokto ili vizitis ĉirkaŭ dek du lokojn, multe drinkis, iris de unu lokalaĉo en alian.

Elinjo: Ĝuste tio estas indigniga, ke tia diboĉema figuro post jaroj aŭdacas elpaŝi kun tia fabelo, kiu... Tio estas indigniga!

Kuracisto: Vi ne indignu, mi petas vin. Vi tre ekamis f-inon Paulino, kio estas aprezena, sed ĉi tie ni serĉas la veron. Ĉu vi ne scivolas pri la vero?

Elinjo: Por sincere diri, ne.

Kuracisto: Nu, pro tio mi envias vin. (*Al Anjo, kiu ĝis nun silentis senmove, tute trankvile.*) F-ino Paulino ĝis nun ne esprimis sin.

Anjo: Havas nenian sencon esprimi min. Tiu estas konscienca homo. Kion li rakontis, povas esti tute vera kun la eta diferenco, ke tiu damo estis ne mi. Estas tamen feliĉe, ke li konfuzas min ne kun murd-isto.

Kuracisto: Tiam mi devas peti f-inon Paulino, ke mi povu alvoki s-ron ĉefinĝeniero Georgi.

Anjo: Bonvolu, voku lin.

Kuracisto. Mi ne petas, ke vi pardonu al mi ĉi tiun tutan priaŭskult-adon, ĉar tion mi ankaŭ ne esperas. Mi nur petas vin, kara infano mia, komprenu min! Por mi ne estas indiferenta la bona famo de mia insti-

tuto, kiun mi ĵaluze gardas jam de dudek jaroj. Kaj ĉefe ne estas indifera por mi tiu familio, kun kiu vi jam de semajnoj daŭre kunestas, kiu vin okulfrape akceptis en sian amon. Jam de la tempo de mia karmemora patro sentas sin la familio hejme en ĉi tiu sanatorio, kaj min ligas tre serioza amika rilato al ĉiu membro de ĉi tiu eminenta familio.

Anjo: S-ro ĉefkuracisto, ĉu vi tute forgesas, kiu rekomendis min al vi? Ĉu grafo Almailla ne estas sufiĉa garantio por vi pri tio, ke ne la inĝeniero diras la veron sed mi?

Kuracisto (*perdas sian trankvilon*): Ja ĝuste pro tio mi estas afliktita, kara fraŭlino, mi estas pli afliktita ol vi, kredu min! Tial mi estas senesperigita! Jes, kompreneble, la grafo rekomendis vin! Sed kion mi faru, se kontraŭ tio staras ĉi tiu neŝancelebla, jam preskaŭ mania insisto de matura, serioza homo pri lia konfeso. (*Sonorigas. Al la enpaŝanta servisto:*) Iru en la salonon, serĉu ĉe la brigantoj s-ron ĉefinĝeniero Georgi, kaj diru al li, ke mi petas lin alveni, li venu tuj ĉi tien. (*Transdonas leteron.*) Kaj ĉi tiun leteron tuj sendigu al la poŝto, oni enpoŝtigu ĝin eksprese.

Servisto (*transprenas la leteron kaj eliras.*)

Kuracisto: Dum s-ro Georgi venas, mi tre petas vin, permesu al mi, paroli kun vi nun jam vere inter kvar okuloj. Nun temos ne pri tio.

Anjo (*konsente*): Bonvolu!

Fr-ino Elinjo eliras.

Kuracisto: Vidu, kara filino mia, restis ankoraŭ io, kio faras la aferon eĉ pli komplika. Mi jam ne scias vere, kion pensi. Vi alveturis por kvar semajnoj laŭ la rekomendo de la grafa moŝto, kaj kun lia financa garantio. La kontoro de la grafa moŝto precize pagis la aktualajn fakturojn tra kvar semajnoj. La kvinan fakturon oni ne pagis. Nek la sesan. Denove ni sendis la fakturojn, nenia respondo. Mi skribis al la grafa moŝto registritan leteron, nenia respondo. Mi telegrafis eĉ dufoje. Nenia respondo. Kompreneble, vi ne povas scii, karega filino, ke oni ne pagas la fakturojn, pri tio ni ne kutimas paroli, sed ne prenu por ĉikano, tio estas jam okulfrapa. Ĉu vi korespondas kun la grafo?

Anjo: Mi skribis al li... antaŭhieraŭ... sed ne pri tio. Pri tio mi ne po-

vis scii.

Kuracisto: Karega filino mia, ne koleru, sed vi estas al mi suspekta. Kiel kuracisto mi devas diri, ke nun vi jam nur simulas la malsanon. Viaj malnovaj simptomoj tute ĉesis. Via sangopremo tute normaliĝis, viaj hemocitoj reproduktiĝas tute normale, ni ĉesigis la heptatan terapion, ne plu donas la striĥnotoninajn vakcinojn, la preskribitaj tri kilogramoj da pezopliiĝo jam delonge estas atingita. Ke pro malforteco kaj nervozeco vi daŭre igas vin akompani de la asistantino, tio estas jam pozo. Kaj tiuj viaj nemotivitaj esploroj, nu tiuj... (*Ridetas.*) Vi enamiĝis al Rudolfo Pál. Pro tio okazas ĉio. Nu, konfesu! Ĉu mi eraris?

Anjo: Ne.

Kuracisto: Nu, vidu!

Anjo: Kaj mi estas enamiĝinta ankaŭ al la patrino de Rudolfo. Kaj al tiu kara, maljuna Manjo. (*tre emociite*) S-ro doktoro, mi estas enamiĝinta ĉi tie al ĉiuj, al fr-ino Elinjo, al la karega maljuna admiralo, al la doktoroj, banistoj, pordisto, servistoj, al ĉiuj, al ĉi tiu silento, al ĉi tiu pureco, al ĉi tiu trankvilo, al ĉi tiuj bonaj homoj, kiuj tiel multe amas min. Mi tre petas vin, atendu ankoraŭ kelkajn tagojn, ne forsendu min, la grafo certe sendos la monon, mi ankoraŭ hodiaŭ telegrafos al li, nur ne forpelu min de ĉi tie! Ĉi tie ĉiuj estas tiel bonvolaj al mi... eĉ vi.

La servisto enpaŝas.

Servisto: S-ro Georgi estas ĉi tie.

Kuracisto: Mi petas lin.

La servisto enlasas Georgi.

Georgi (*riverencas al Anjo*): Ordonu al mi, s-ro doktoro!

Kuracisto: Bonvolu sidiĝi.

Georgi: Dankon. (*Ne sidiĝas.*)

Kuracisto: Fraŭlino, antaŭe mi sciigis al vi, mi klopodis redoni de vorto al vorto ĉion, kion s-ro ĉefinĝeniero Georgi rakontis al mi pri vi. Vi decide diskutas la veron de ĉi tiuj asertoj.

Anjo: Jes.

Kuracisto: Pro ĉi tiu antaŭvidita kazo mi demandas la s-ron ĉefinĝeniero, ĉu li estas preta kontraŭ via negado diri al vi en la vizaĝon tion,

kion li estis rakontinta. La s-ro ĉefingĝeniero kompleze entreprenis tion. Do nun... ĉi tie estas la s-ro ĉefingĝeniero.

Anjo turnas sin al Georgi kaj rigardas lin atente.

Georgi (*al la kuracisto*): Mi vidis la fraŭlinon antaŭ jaro kaj duono en Triesto en mizera dancamuzejo. La fraŭlino servis tie kiel trinkiga knabino, interbrakumis sin kun ebriaj maristoj, kaj kune kun la membroj de mia societo diris obscenaĵojn, kisadis ilin, kaj akceptis por tio trinkmonon. La tavernaĉo troviĝas en la haveno, ĝia nomo estas Brazilia-Bar. Tiutempe, kun kelkaj miaj amikoj, ĉiuj ĉiamfraŭloj, ni vivis nedecan, diboĉan vivon, amuziĝis tra noktoj, drinkis, serĉis plezurojn en ĉiuj tavernaĉoj, tiel mi trafis tien. Kaj tio, ke mi malkovras la aferon, servu por mi kiel senkulpigo, ja tio estas mia devo, ĉar ĉi tie restadas elitaj familioj, junaj knaboj kaj knabinoj, kaj min ligas al la s-ro ĉefkuracisto, kiu estas respondeca por la societo de ĉi tiuj familioj, malnova, se ne amikeco, tamen bona konateco kaj respekto. Mi ne povas rigardi tra semajnoj, ke kun la morala garantio de la sinjoro ĉefkuracisto la fraŭlino rolu inter filoj kaj filinoj de prestiĝaj familioj kiel apartenanta al ili. Tio tuta estas por mi senfine ĝena, sed se la vivo jam alfrontigis min al tia situacio, mi estas devigita malfermi mian buŝon. Ne rigardu min la fraŭlino ekzekutisto, sed ni vivas en alia mondo, kaj en nia mondo viro havas devojn.

Kuracisto: Karega filino, agnosku... La damoj de la familio Pál akceptis vin inter sin kvazaŭ propran filinon. Kiu ne estas blinda, vidas, ke vi delogis tiun junulon, kaj tiu junulo, ilia unusola filo enamiĝis al vi, kaj la tuta afero vojas al tio, kio, ni eldiru, kutimas gvidi al geedzeco! Kaj ĉio ĉi okazas kun mia subteno, kun mia garantio, kun mia aprobo. Kiel mi do rigardos en iliajn okulojn, se evidentiĝos, ke vi miskondukis nin en tiel terura maniero!

Anjo: Mi ne miskondukis vin. La s-ro ĉefingĝeniero hontu. Ĉio ĉi ne povus okazi, se estus kun mi ĉi tie viro, kiu povus defendi min. Sed ĉi tie duope... Vi kuntenas vin kontraŭ knabino... Du severaj homoj... kion mi faru sola kontraŭ vi? La s-ro ĉefingĝeniero ne mensogas, ĉar li havas nenian motivon por tio. Sed li eraras, eraras, eraras, eraras, eraras!

Georgi (*mute, nee skuas la kapon.*)

Anjo: Kaj... la du karegaj maljunulinoj... nun baldaŭ ankaŭ ili... kaj ilia filo... Terure, kion vi faris al mi, senskrupula homo. Nun kion mi faru? Almenaŭ atendu, ĝis mi skribos al mia patrino kaj onklo, kiu estas direktoro de grafo Armaila... mi skribos ankaŭ al la grafo mem.. nur atendu ĝis tiam, mi postulas tion!

Georgi: Vidu, kara fraŭlino...

Anjo (*ne lasas lin paroli. Al la kuracisto*): Kaj ne estas vero, ke mi delogis tiun knabon! (*krie*) Kia vorto, ke mi delogis lin?! Ili ekamis min, ili ĉiuj, la karegaj maljunulinoj kaj ankaŭ ilia filo... mi estas fiera pri tio... mi estas feliĉa pro tio... mi estas mizera, malriĉa orfino... mi havas en la vivo nenion... krom luktado. Mi jam rompigi kaj malsaniĝis pro tio... kaj tiam mi venis ĉi tien, kaj ĉi tie mi trovis iom da varmo, iom da sekureco, amon... mi neniam estis feliĉa en mia vivo, nur nun... (*al Georgi*), kaj vi nun volas ĉion forpreni de mi... vi volas elĵetigi min nur pro tio, ke vi nebule memoras ion... (*krie*), kaj eksciu, ke se mi estus centoble tio, kio vi diras min, vi egale ne devus forpreni mian vivon, kaj se mi estus tio, kio vi diras min, tiam ĉi tio estus... purigo por mi, kaj ĉi tio estus savo de mizera vivo... kaj tiam ĉiu honesta homo devus helpi min ĉe tio, kaj ne repuŝi min en la koton, kiam mi volas elbarakti el ĝi... Ĉu tion instruis al vi Kristo, la mizerikorda? Respondu! Ĉu tion Li instruis?... Se mi estus, kio vi min diras... eĉ tiam vi ne devus treti min en koton! Tiel memcerte elpaŝi... pro necerta memoraĵo, pri kiu vi ne kuraĝus ĵuri antaŭ tribunalo... se temus pri via vivo aŭ morto... vi ne kuraĝus ĵuri... kvankam ĉi tie... temas ja pri vivo aŭ morto! (*Ne ploras, sed multe emociita, malfortiĝinta, kroĉas sin al seĝo.*)

Longa paŭzo.

Georgi (*mallaŭte, simple*): S-ro ĉefkuracisto, mi petas vin kun respekto, konsideru malaktuala, kion mi ĝis nun diris. Mi fariĝis kvindek-jara, ĉiam kun certeco mi movis min en la vivo, sed mi estas bona kristano kaj havas konsciencon. Mi eldiras, ke povas esti, ke mi eraris, kaj prenas sur min la rilatan honton kaj ĉiujn malagrablaĵojn. Povas esti, ke mi eraris. Ankaŭ mi estas homo. Al tiuj lokoj, kie mi kredis vidi

la fraŭlinon, oni iras kutime jam ebria. Tio estu mia unusola senkulpigo. Ĉu la fraŭlino permesas, ke mi solene petu pardonon antaŭ la ĉefkuracisto?

Anjo: Ne.

Paŭzo.

Kuracisto (sonorigas. *Al la enpaŝanta servisto*): Fr-inon Elinjo. (*La servisto eliras, Elinjo enpaŝas.*)

Kuracisto: Akompanu s-inon Paulino en ŝian ĉambron!

Elinjo elkondukas tenere la malfortiĝintan Anjon.

Paŭzo.

Kuracisto: Kaj nun... s-ro ĉefingenero... ĉu nun jam ankaŭ inter kvar okuloj vi povas diri la samon?

Georgi (*simple*): Per la deklaro mi definitive fermis ĉi tiun aferon. Bonvolu permesi al mi reiri al miaj briĝpartneroj!

Kuracisto: Bonvolu!

Georgi klinas sin kaj foriras. La sceno malheliĝas.

Kvara bildo

Modesta kontoro de eta vilaĝa poŝtoŝtelo. Unu fenestro kun ferkrado.

Pluraj tabloj. Telefonoj. Morsilo. La sepa horo vespere.

Duonhoron post la antaŭa bildo. Poŝtoŝtelisto, tute juna, plaĉa knabo, preskaŭ infano en uniformo sidas ĉe monotone frapanta morsilo.

Post mallonga paŭzo enpaŝas Anjo, ekscitite.

Poŝtoŝtelisto (*saltleviĝas*): Anjo! (*Feliĉe rapidas al ŝi.*)

Anjo (*anhelante*): Mi havas nur kelkajn minutojn.

Poŝtoŝtelisto (*volas brakumi ŝin*): Anjo, mia kara Anjo!

Anjo: Ve, nun ne malhelpu min, mi rapidas! (*Sed deviĝas toleri la varmegan brakumon kaj longan kison de la junulo. Poste tenere liberigas sin. Rigardas la knabon.*) Kio trafis vin? Vi estas pala, kaj viaj okuloj estas tute... Kio okazis?

Poŝtoŝtelisto: Mi ne dormas. Mi ne povas manĝi. Mia vivo estas

transturnita. Mi amas vin, Anjo. (*Ree volas brakumi ŝin.*)

Anjo: Pro Dio, kara, lasu nun tion. Mi havas nur kelkajn minutojn. Mi ne devas malfrui la vespermanĝon. La ĉefkuracisto sendis ĉi tien antaŭ dek kvin minutoj leteron per la servisto, por ke li enpoŝtigu ĝin registritan eksprese... al la adreso de la grafo. Al Triesto. Pro ĝi mi al-kuris. Kie estas la letero?

Poŝtoficisto (*elprenas ĝin el tirkesto*): Jen ĝi. Min kaptas korbatado ĉiufoje, se oni portas leteron el la sanatorio. Ĉi tiu estas la kvina send-aĵo..., kiun mi malaperigas... por via kontento. Mi trafos en prizanon.

Anjo (*senpacience*): Donu ĝin al mi!

Poŝtoficisto (*transdonas la leteron.*)

Anjo (*rigardas ĝin*): Kio, ĉu vi jam malfermis ĝin?

Poŝtoficisto: Jes. La kuracisto skribas al la grafo, ke en la sanatorio vi enamiĝis al knabo.

Anjo (*legante la leteron*): Li mensogas.

Poŝtoficisto: Li skribas laŭvorte, ke... (*Rigardas en la leteron, kiun Anjo senvorte legas.*) Li skribas (*legas*), ke ŝia terapio finiĝis, ŝi povas hejmeniri. Eĉ, mi petas vin nepre voki ŝin urĝe hejmen, ĉar ŝi ĝisorele enamiĝis al ĉi tie restadanta junulo, Rudolfo Pál, kun ĉiuj simptomoj de histeria amo.

Anjo (*legante la leteron*): Li mensogas.

Poŝtoficisto: Kaj mi... mi trafos pro vi en prizanon.

Anjo (*levas la kapon el la letero. Nervoze*): Kia parolo daŭre! Trafi en prizanon! Vi ĉiufoje asertis, ke vi tiel aranĝas la aferon, ke oni ne malkaŝos ĝin. Vi diris, vi faras tiel, ke oni kredu, aliloke perdiĝis la mesaĝoj. (*Legas plu la leteron.*)

Poŝtoficisto: Mi nur diris tion. Vi ne konas la funkciadon de la poŝto.

Anjo (*legante la leteron*): Mi ne konas ĝin. Tial mi kredis al vi. (*Levas la kapon el la letero.*) Kial vi miskondukis min? Kial vi mensogis? (*Legas plu.*)

Poŝtoficisto (*ridetas*): Kiaj demandoj! Vi volis tion, do tiel okazis ĉio. Kaj nun mi devas ekscii, ke pro alilulo... pro aliulo vi volis... pro aliulo vi volas forveturi.

Anjo (*ĵetas la leteron sur la tablon*): Ba, vi estas malsaĝa. Vi estas

infano.

Poŝtoficisto: Tio mi estas.

Anjo: Vi devas scii, pro kiu mi luktas, por resti ĉi tie. Vi devas tion scii. De semajno. Tio estas mia frenezo... kun vi... ĉu tio ne estas sufiĉa pruvo?

Poŝtoficisto: Sed la letero de la kuracisto.

Anjo: Li mensogas.

Poŝtoficisto: Li skribas, ke vi volas edziniĝi al tiu knabo. Tie estas skribite. Laŭvorte. Vi povis legi.

Anjo: Ba, kial vi kredas lin? Kiel li sciis, kiun mi amas... kaj pro kiu mi ne povas foriri de ĉi tie... (*Kisas lin.*) La kuracisto timas pri sia mono. Jen tie estas, kion li skribas pri la fakturoj. Nun mi venas de li, li venigis min al si pro la fakturoj. Vi scias, mi diris al li, ke se la grafo ne pagos, tiam mia patrino pagos. Mia patrino ne estas riĉa, sed kelkajn sanatoriajn fakturojn ankoraŭ eltenas! Kaj nun mi trafis en peĉon, ĉar li eksciis, ke ni estas malriĉaj. Permesu al mi sidiĝi, ĉar miaj kruroj tremas. Kion mi diris? Jes, ke mia patrino pagos. Pli ĝuste ne. La kuracisto eksciis, ke tio ne estas vera. Iu... iu inĝeniero alvenis el Triesto... (*Nervoz, senorde parolas.*) Ĉu vi scias? Hodiaŭ matene li alveturis.

Poŝtoficisto: Nu, kaj?

Anjo: Li donis pri mi malbonajn informojn.

Poŝtoficisto: Kiujn malbonajn informojn?

Anjo: Li malkaŝis, ke mia patrino estas tute senhava. Ke ni estas prestiĝa familio, sed ni vivas per la pano de la grafo. Li malkaŝis, ke... ke mi laboras en fabriko, en kudrejo... Kion vi jam delonge scias. Do... fabrika laboristino... Tio ne imponas al li. Tial li skribis tion. Li elpuŝos min.

Paŭzo.

Poŝtoficisto: La kvina sendaĵo..., kiun mi malaperigas... Kaj vi amas iun alian...

Anjo: Ba, jam lasu tion!

Poŝtoficisto: Sed mi ne plu eltenos! Mi ne plu eltenos! Dum mi kredis, ke mi estas ties kaŭzo, dum tio... Sed nun, ke mi eksciis... mi ne

plu eltenos!

Anjo (*tre nervoze*): Ĉu vi ne ĉesos?

Poŝtoficisto: Ne! Mia menso laboras, mi streĉas mian memoron, por revoki ĉiun minuton; Dio mia, kiel alie mi nun vidas la tuton. Kiam la doktoro unuafoje telegrafis al la grafo... kontraŭ vi... „mi petas telegraman respondon”. Ĉu vi memoras? Kiam vi venis ĉi tien nokte... vi eskapis, por ĉi tie atendi la respondon... kaj vi sciis, ke mi estas enamiginta al vi... kaj vi kisis min... vi diris, ke jam delonge mi plaĉas al vi... kaj... kaj... mi kapturniĝis de la feliĉo. Ĉu vi memoras? Kiam tiun unuan nokton... en la interkisadon neatendite enfrapadis la morsilo. Vi bone elkalkulis. La respondo alvenis..., ke tuj oni resendu vin hejmen, la grafo ne plu pagos por vi, ĉar via tempo plenumiĝis... Kaj mi...mi... disŝiris la telegramon, por ne perdi vin.

Anjo: Mi petis vin disŝiri ĝin.

Poŝtoficisto: Sed ne pro mi! Vi petis pro aliulo! Nur nun mi komprenas la tuton. Vi venis ĉi tien, por mem ordoni en la poŝtofacejo. Tial vi kisis min, tial vi frenezigis min! Por resti kun la alia!

Anjo: Ĉu vi faras scenon?

Poŝtoficisto (*plorante*): Kiel multe vi devas ami tiun knabon..., por ĵeti vin tiel pro li al mizera, vilaĝa poŝtoficisteto!

Anjo: Parolo malsaĝa!

Poŝtoficisto: Mi kompatinda malsaĝulo... mi faris plu... Venis la cetero kiel lavango: la letero de la grafa kontoro, registrita letero, por ke oni elĵetu vin. La telegramoj de la kuracisto, la urĝadoj. Kaj kio estis la plej terura: la fervoja bileto kaj la vojaĝkosto, kiujn la grafo sendis al la adreso de la kuracisto. Nuraj registritaj sendaĵoj... nuraj registritaj poŝtaĵoj... nuraj sanktaĵoj... Mi donis ĉion al vi, mi malaperigis ĉion, nur por ke vi ankoraŭ povu resti. En malsaĝa ebrio, nur por gajni ankoraŭ unu tagon kaj alian tagon kaj trian tagon. Kaj nun mi ekscias, ke mi aĉetis ĉi tiujn tagojn por aliulo, por ĉi tiu terura prezo! (*Ploras kiel infano.*) Por tiel terura prezo mi aĉetis tagojn por aliulo!

Anjo: Vin mi amas.

Poŝtoficisto: Kiel velke vi diras tion. Kiel malbone vi mensogas.

Anjo: Mi pruvis tion.

Poŝtofiscisto: Kiel? Mi volis forlasi mian dungon, mian patrinon, por foriri kun vi! Vi ne volis veni kun mi! Nun mi jam scias, kial vi ne venis.

Anjo (*stariĝas*): Mi ne povas resti. Mi estas terure nervoza. Kaj oni serĉos min, se mi malfruos la vespermanĝon. (*Disŝiras la leteron en pecojn.*) Mi devas kuri hejmen.

Poŝtofiscisto (*kaptas ŝian brakon*): Vi trompis min! Vi misuzis min!

Anjo: Kaj estas nenio, ĉu nenio, ke mi iĝis via amatino? Ĉu nenio? Ĉu tio ne pravas, ke pro vi okazis ĉio? Kio? Ĉu vi do kredas, ke mi kapablis... doni min al vi, nur por ami iun alian?

Poŝtofiscisto: Jes! Jes!

Anjo: Tiam vi ne scias, kiu mi estas! (*Liberigas sin.*)

Poŝtofiscisto: Ĉu mi ne scias, kiu vi estas? (*En implikita bulo forprenas morsajn rubandojn de la tablo. Faligas sin sur la tablon, en la mano kun la pendanta, serpentumanta telegrafa bulo, kiun spasme skuas.*) Mi... mi scias, kiu vi estas!

Anjo: Kio estas tio?

Poŝtofiscisto: Ĉi tiu rubando... ĉi tiu rubando...

Anjo: Kio estas tio?

Poŝtofiscisto: Hodiaŭ tagmeze ĝi venis de la grafo.

Anjo: Ĉu por mi?

Poŝtofiscisto: Ne, al la kuracisto, mi retenis ĝin.

Anjo: Montru ĝin!

Poŝtofiscisto (*prenante ĝin ambaŭmane, malrapide legante disvolvas la rubandon*): „Pri Anjo Paulino venis nenio informo de du semajnoj. Se ŝi ankoraŭ restadas tie, mi petas vin tuj resendi ŝin hejmen, pro facilanimeco mi sendis ŝin tien, ŝi ne estas tiu, kiu mi vidigis ŝin, sed koruptita knabino el havena tavernaĉo... (*Haltas.*) ... koruptita knabino el havena tavernaĉo.”

Anjo (*krie*): Plu!

Poŝtofiscisto: „Ŝia mastro hieraŭ turnis sin al la polico, oni serĉas la knabinon ĉe mi, mi rifuzas ĉiun pluan garantion, mi petas tujan sciigon, grafo Armaila.”

Longa paŭzo. La poŝtofiscisto malrapide disŝiras la rubandon. Anjo silentas.

Poŝtoficiŝto: Nu do, mi scias, kiu vi estas. Ĝi alvenis hodiaŭ tag-meze, kaj de tiam mi eĉ pli... eĉ miloble pli mi amas vin.

Anjo (*senvorte karesas la kapon de la knabo.*)

Poŝtoficiŝto: Nun ni foriru de ĉi tie... ni fuĝu. Kien ajn mi iros kun vi.

Anjo: Ne eblas.

Poŝtoficiŝto: Ĉar tiu knabo... en la sanatorio.

Anjo (*sovaĝe*): Jam ĉesu pri li!

Poŝtoficiŝto (*ribelas*): Ne! Vi amas lin! Tiun vi amas! Pro li vi faras ĉion! Min vi nur uzis, tiu estas via amato... via vera amato! (*Stariĝas kaj paŝas al ŝi.*)

Anjo (*timas lin*): Frenezulo! Jes, foje li faris al mi proponon. Kiel vi imagas? Ĉu ĝuste tiu? Bezonas lin Belzebuto! Mi preskaŭ batis lin.

Poŝtoficiŝto: Mi ne kredas vin! Nun mi jam ne kredas! Kiu konas vin?

Anjo (*volas brakumi lin*): Kiu konas min, se ne vi? Ĉu mi ne venis al vi nokte?

Poŝtoficiŝto (*tenere reŝovas ŝin*): Mi ne kredas! Mi ne kredas! Vi bezonas min, tial vi venas al mi! Mi estas via viktimo! Nur tiam mi kredos vin, se ni forkuros kune for... al Ameriko. Mi lasos ĉion ĉi tie, per miaj du manoj mi laboros, lavos vazojn, almozos, ŝtelos... rabos, nur por povi resti kun vi... ĉar alie... mi faros finon al ĉio, se vi ne venos kun mi! (*Sovaĝe prenas ŝin en la brakojn.*) Kial vi ne respondas?

Anjo: Hodiaŭ nokte mi revenos, tiam mi respondos.

Poŝtoficiŝto: Restu nun ĉi tie... restu por eterne kun mi!

Anjo: Ne eblas.

Poŝtoficiŝto: Ĉu nokte vi revenos? Ĉu vi ĵuras?

Anjo: Mi ĵuras.

Intensa, sovaĝa kiso, kiu finiĝas per la skuplora de Anjo.

Kurteno

TRIA AKTO

Kvina bildo

La salono de la sanatorio, tiel kiel en la antaŭa akto. La saman vesperon, je la naŭa horo, post la vespermanĝo. Lumo malantaŭ la fona vitra pordo. Tie, en la restoracio nun finiĝas la vespermanĝo. Sur la scenejo estas neniu, nur Rudolfo, kiu senpacience iradas tien-reen.

Post mallonga paŭzo de maldekstre enpaŝas Anjo.

Ruĉjo (*rapidas al ŝi*): Anjo, kio okazas? De posttagmezo mi ne vidis vin.

Anjo: Mi venas el mia ĉambro.

Ruĉjo: Vi havis hodiaŭ posttagmeze ian malagrablaĵon, kaj mi scias nenion. Pro Dio, rakontu, kio okazis? Kial vi ne vespermanĝis kun ni en la restoracio?

Anjo: Mi ne fartis bone. Mi vespermanĝis en mia ĉambro kun fr-ino Elinjo.

Ruĉjo: Sed antaŭ vespermanĝo mi serĉis vin, vi ne estis en via ĉambro. Poste mi eksciis, ke vi denove estis en la poŝtoficejo.

Anjo: Ĉu „denove”?

Ruĉjo: Jes ja, denove.

Anjo: Mi devis enpoŝtigi telegramon, la poŝtoficejon oni fermas je la sesa horo, mi devis iri mem, por ke oni akceptu ĝin post la oficialaj horoj.

Ruĉjo: „Oni akceptu ĝin”. Por ke la poŝtoficisteto akceptu ĝin.

Anjo (*riproĉe*): Ruĉjo!

Ruĉjo: Kial vi ne vespermanĝis kun ni?

Anjo: Depost hodiaŭ posttagmeze mi ne havas emon iri inter tiujn. Ili detruis mian trankvilon.

Ruĉjo: Tiu inĝeniero.

Anjo: Ankaŭ tiu. Kaj la doktoro.

Ruĉjo: Mi scias nur tiom, ke onklino Manjo respondecigis posttagmeze la inĝenieron, ĉar en iu interparolo li plorigis vin. La inĝeniero diris, ke li konas vin, kaj ke vi tion pridubis. Nun temas denove pri tio,

kaj nun la inĝeniero diras, ke li ne konas vin. Mi demandis la doktoron, li levis la ŝultrojn kaj respondis, ke mi ne intermiksi min!

Mallonga paŭzo.

Anjo: Mi estas nervoza. Mi tre nebone fartas.

Ruĉjo: Karega mia Anjo. KREDU al mi... (*Movas sin al li, sed retropaŝas.*)

La admiralo enpaŝas el la restoracio, iras al la briĝtabloj fone dekstre, kaj starante, li oportuneme ekbruligas cigaron.

Admiralo (*dum la ekbruligado de la cigaro*): Filino Anjo, kial vi ne vespermanĝis kun ni?

Anjo: Ĉu oni sentis mian mankon?

Admiralo: Mi tre.

Anjo: Mi ne bone fartis. Mi manĝis ion en mia ĉambro.

Admiralo: Sed nun jam estas nenio malbona, mi esperas.

Anjo: Nun jam... nenio.

Ruĉjo: Ŝi estas nervoza. Tre nervoza.

Admiralo: Ĉu daŭre plu la posttagmeza afero? Mi aŭdis ion, sed eĉ imagon mi ne havas, kio okazis. Unu afero estas certa, Anjo: kio ajn okazu, vi pravus.

Anjo: Ĉu? (*Ridetas.*)

Admiralo: Ĉiufoje! (*Paŝas al ŝi.*) Ĉu vi rakontos al mi, kio vin trafis?

Anjo: Kompreneble. Sed ne nun.

Admiralo: Ĉi tiu inĝeniero estis al mi jam en la unua minuto ne simpatia.

Anjo: Ho, la inĝeniero, kontraŭ li mi havas nenion riproĉindan. Kontraŭ li ne.

Admiralo: Do kontraŭ kiu? Ĉu la doktoro?

Anjo: Prefere kontraŭ li.

La vitra porto de la restoracio malfermiĝas kaj restas malfermita. Videblas, ke oni stariĝas de la vespermanĝa tablo. Sur la sojlo babilas Georgi. La ĉefkuracisto, vestita civile kaj kelkaj gastoj. Ne aŭdeblas, pri kio ili parolas.

Anjo (*ekiras eksteren, flanke*): Mi reiras en mian ĉambron.

Ruĉjo: Kial?

Anjo: Nun... mi ne volas ilin vidi.

Admiralo: Vi estas tre nervoza. Vi ne devas esti. Kia ideo estas foriri antaŭ ili. Mi iros ĝis la radiko de la aferon. Vi restos ĉi tie. Vidu, kia ideo!

Anjo: Karega ekscelenca moŝto! Vidu, povas esti, ke mi kulpas. Mi estas tre sentema, sed nun mi ne scipovas konversacii kun la doktoro kaj la inĝeniero. Tio baldaŭ pasos. Eble morgaŭ. Mi ne scipovas rigardi en la okulojn al tiuj du karegaj maljunulinoj. Dio scias, kion ili nun pensas pri mi. Mi ne transvivus, se ankaŭ ili turnus sin kontraŭ mi.

Ruĉjo: Sed kia aserto estas, ke ili turnus sin kontraŭ vi? Kia sekreto kaŝiĝas ĉi tie? Kio okazis? Ĉu ia klaĉo?

La societo, staranta sur la sojlo, enpaŝas.

Anjo: Mi petas vin, lasu min nun foriri. Mi havas la senton, ke tie ĉiuj flustradas pri mi. Mi ne volas vidi tiun homon.

Admiralo: Karega filino, tio ne estas tiel simpla. Mi ne toleras tion. Bone, nun eliru, sed nur ĝis la legoĉambro, tie sidiĝu kaj legu ĵurnalon, ĝis mi iros por vi. Ĉu vi komprenas? Kaj se oni estas ĉi tie ĉiuj kune, mi eliros por vi kaj rekondukos vin. Ni vidos, kiu aŭdacos elpaŝi kontraŭ vi. Nun iru, filino!

Anjo: Kiel bona vi estas al mi. (*Volas kisi lian manon.*)

Admiralo (*retiras la manon*): Diru, filineto, ĉu vi freneziĝis?

Anjo elrapidas maldekstre.

Ruĉjo (*al la admiralo*): Tio terure zorgigas min. Ĉi tiu malfeliĉa knabino tute ŝanĝiĝis. Tiel maltrankvilan neniam mi vidis ŝin.

Admiralo: Nu, mi faros ĉi tie ordon.

La kuracisto kaj Georgi el la diskutanta societo venas pli proksimen. Fone sur la sojlo haltas s-ino Pál, pli malfrue envenas kun Manjo kaj la asista kuracisto. Post ili envenas kelkaj gastoj. Ili iras al la briĝtabloj. Kelkaj ekfumas.

Kuracisto (*al Georgi, daŭrigante interparolon*): Havas nenian sen-

con forveturi. Hodiaŭ matene vi ja alvenis. Estas ridinde.

Georgi: Ne, ne, bonvolu kompreni min! Morgaŭ matene mi nepre forveturos. Aŭtune mi revenos. Tre malbone mi sentas min ĉi tie. Jen tiuj maljunulinoj sendas al mi fulmojn el siaj okuloj. Kaj la juna amiĝinto eĉ pli. Agnosku, tio ne estas por mi refreŝigo. Mi estas trolaborinta, mi venis ĉi tien refreŝigi. Nu, tio ne sukcesis. Kaj mi devas tiri la konsekvencon.

La admiralo paŝas al ili.

Admiralo: Kio? Ĉu ŝtatsekreto?

Kuracisto (al la admiralo): Ne, ne. La s-ro ĉefingénieur forlasos nin. Morgaŭ li forveturos.

Admiralo: Kial? Li ja hodiaŭ alvenis.

Georgi: Jes, sed mi estas vokita telegrafe al Londono.

Kuracisto: La s-ro ĉefingénieur konstruas ponton.

Admiralo: Ĉu de ĉi tie ĝis Londono? Longa ponto.

S-ino Pál (mallaŭte): Nu, kio trafis vin, filo? Ĉu ankaŭ vi estas nervoza?

Ruĉjo: Por sincere konfesi, patrino...

S-ino Pál: Hodiaŭ ĉiuj estas tre nervozaj en ĉi tiu domo.

Kuracisto (por paroli pri io alia, al la admiralo): Por la ekscelenca moŝto legeblas sensacia informo en iu viena ĵurnalo.

Admiralo: De kia speco?

Kuracisto: La ŝtato Paragvajo eldonis tutan serion da novaj poŝtmarkoj en dudek du diversaj koloroj.

Admiralo: Ĉi tiuj malgrandaj ŝtatoj ruinigas la filatelistojn. Ĉiumonate nova serio. (*Ekiras al la briĝantoj.*)

S-ino Pál (al Ruĉjo): Kie estas Anjo?

Ruĉjo: Ŝi vespermanĝis supre en sia ĉambro. Mi kredas, pli malfrue ŝi venos malsupren por tempeto.

S-ino Pál: Ĉu ŝi ne bone fartas?

Ruĉjo: Ŝi estas maltrankvila, nervoza... (*Kapgestas al Georgi.*)... pro tiu...

Manjo (al la kuracisto): Doktoro, mi ne volis fari skandalon ĉe la

vespermanĝo, sed se ankoraŭfoje mi ricevos anstataŭ normala plado verdajn foliojn, mi forgesos mian bonan edukiĝon. Nun jam la trian tagon mi devas vespermanĝi herbon.

Kuracisto (*ridante*): Kion do vi ŝatus vespermanĝi?

Manjo: Ĉu mi? Porkidan frikasaĵon.

Kuracisto: Dio gardu!

Manjo: Ej nu, eksciu do, ke se mi hejmeniros, jam la unuan tagon mi manĝos grandan teleron da porkida frikasaĵo, krome-krone por matenmanĝo. Kun du glasetoj da rekrementa brando. Nu, tion mi eldiris. (*Lasas lin surloke.*)

Fone formiĝas grupo de briĝantoj.

S-ino Pál (*staranta kun Ruĉjo, al Georgi*): S-ro ĉefinĝeniero, tre interesus min, ĉu vi bonvolus informi min pri tiu posttagmeza diskuto, kiu impresis tiel forte nian filinon Anjo.

Georgi: Pardonu min, altmoŝta sinjorino, sed mi ne sentas min rajtigita paroli pri tio kun aliuloj. KREDU al mi, la tuto ne estas interesa. Vere sensignifa.

S-ino Pál (*ridetante*): Do vi ne esprimas vin.

Georgi: Nu, se tiel tio pli bone sonas, ni diru, ke mi ne esprimas min.

Manjo (*al la kuracisto*): Doktoro! Kie estas Anjo?

Kuracisto: Mi ne scias.

Manjo: Doktoro! Venu ĉi tien!

Kuracisto (*aliras*): Jen mi.

Manjo: Kial ne vespermanĝis kun ni Anjo?

Kuracisto: Ŝi diras, ke ŝi ne fartis bone kaj opiniis pli bona portigi la vespermanĝon en sian ĉambron.

Manjo: Diru, doktoro, ĉu vi ne volas paroli kun mi normale? Kial vi elokventaĉas? Diru al mi tuj, kio okazis al ĉi tiu knabino!

Kuracisto: Bonvolu kredi, mi ne scias.

Asista kuracisto (*en blanka kitelo, venante de la briĝantoj, al Ruĉjo*): Vi estas petata alsidiĝi, la batalo komenciĝis.

Ruĉjo (*nervoze*): Dankon, nun mi ne ludos. Eble pli malfrue. (*Iras al*

Georgi.)

Unua damo (*al la asista kuracisto*): Estas absurde, doktoro, ke vi daŭre vivas por la briĝo.

Asista kuracisto: Sed, nobelina moŝto, mi ne kartludas, nur ĉi tie mi senfaradas, ĝis oni venos por mi, ankoraŭ kvin ĉambrojn mi devos viziti ĉi-vespere.

Dua damo: Venu, ludu ĝis tiam pianon! Venu kun mi!

Unua damo (*tiras lin dekstren*): Jes, jes, venu, pianludu iom al ni!

Kartludanta gasto: Sed ne tro laŭte!

Unua damo: Ne zorgu, li ludos plej mallaŭte. Venu!

La du damoj eliras kun la asista kuracisto dekstren. Mallaŭte eksonas piano, kiu poste aŭdiĝas kun paŭzoj.

Ruĉjo ĝis nun fikse rigardis Georgi kaj atendis, dum tiu konversaciis kun gasto. La gasto nun ekiras al la briĝantoj. En la momento, kiam Georgi restas sola, Ruĉjo alparolas lin.

Ruĉjo (*mallaŭte sed decide*): Vi ĵus diris al mia patrino, ke vi ne esprimas vin.

Georgi: Mi diris.

Ruĉjo: Kaj mi nun postulas de vi, ke vi esprimu vin.

Georgi: Kun kia rajto, se estas permesite demandi?

Ruĉjo: Sen ĉia klarigo mi postulas, ke vi esprimu vin.

Georgi: Lasu min en paco!

Ruĉjo: Mi atentigas vin, ke mi toleros de vi nenion tian, kio...

Georgi (*senpacience interrompas lin*): Vi nun volas kruci kun mi la spadon. Mi ne forkuros.

La kuracisto ekatentas kaj alpaŝas.

Kuracisto: Kio okazas, sinjoroj?

Georgi: Ĉi tiu juna sinjoro... mi ne scias, kion li volas de mi. Eble la s-ro ĉefkuracisto diris ion al li.

Kuracisto: Ĉu mi? Ne. Nek vorton. (*al Ruĉjo*) Kion vi volas de la s-ro ĉefinĝeniero?

Ruĉjo (*iom pli laŭte*): Tio estas afero de ni du. De la s-ro inĝeniero kaj de mi.

La briĝantoj ekatentas.

Georgi: En la strikta senco de la vorto, li atakis min.

S-ino Pál (*el inter la briĝantoj*): Bone vi faris tion, filo.

Kuracisto: Ej nu, sinjorino! Kial li faris tion bone?

S-ino Pál (*demetas la kartojn. Trankvile, decide*): Tial li agis bone, ĉar tiel trovas mi, ke li faris tion bone. (*nervoze*) Kio okazis al mia filino?

La admiralo eliras tra la malfermita restoracia pordo.

Kuracisto: Mi tre petas vin... tia nervozeco havas nenian sencon. Ĉiuokaze mi riskas peti vin, altmoŝta sinjorino, ke ne prenu tiel decidan starpunkton, dum vi ne estas tute informita pri la afero.

S-ino Pál: Kiel vi komprenas tion?

Georgi (*al Manjo, preterpasanta lin. Subvoĉe*): Vidu, altmoŝta sinjorino... (*Volas paroli.*)

Manjo: Unue mi estas sinjorina moŝto, due ne flustru kun mi, mi ne havas sekretojn kun vi.

Georgi: Sed mi ja ankoraŭ nenion diris!

Manjo: Vi ankaŭ ne bezonas. Sufiĉas pasumi kun tia mieno. Ne parolu, mi petas vin! Mi vidis kaj aŭdis hodiaŭ posttagmeze, kiam vi plorigis nian filinon. Tio sufiĉas por mi.

Kuracisto: Pardonu min, mi devas defendi la s-ron ĉefinĝeniero, li nome...

Manjo (*interrompas lin*): Vi devas defendi ne la s-ron ĉefinĝeniero sed tiun knabinon. Tio estas via devo. Vi ne stariĝu flanken de la inĝeniero, vi stariĝu apud la knabino, Dio scias, kiu estas la inĝeniero, kio estas la inĝeniero, kiu kaj kio li estas, kion li volas de tiu knabino, sen-defenda fraŭlino, kiu estas ĉi tie sola, jes, jes, vi devas stariĝi ŝiaflanken, se ne troviĝas alia viro, kiu estus ĉe ŝia flanko.

Georgi: Sed mi petas vin...

Manjo: Lasu min en paco!

Kuracisto (*al Ruĉjo*): Ej nu, io tia ankoraŭ neniam okazis en ĉi tiu satorio.

En la malfermita pordo de la restoracio aperas la admiralo. Kun Anjo sub la brako. Li haltas por momento, poste malrapide kondukas Anjon

tra la salono. Ili haltas antaŭ Georgi.

Admiralo: Mi aŭdis, ke la s-ro ĉefinĝeniero morgaŭ forveturos. Por mi gravas, ke vi adiaŭu ŝian fraŭlinan moŝton Anjo.

Momenta paŭzo.

Georgi: Mi kisas vian manon.

Anjo (*etendas sian manon.*)

Georgi (*kisas ŝian manon. Klinas sin al la admiralo kaj ekiras.*)

Kuracisto: Dankon.

Georgi: Ne dankinde. (*Foriras.*)

Momenta paŭzo.

Manjo (*apud la admiralo*): Ekscelenca moŝto, ĉu vi permesas ion?

Admiralo: Kion, sinjorino?

Manjo: Ke mi kisu vin.

Admiralo: Kun plej multa ĝojo.

Ili kisas unu la alian.

Manjo: Tio agrablis. De kvindek jaroj mi ne kisis soldaton. La tutan nokton mi ne dormos. (*Iras al la kartludantoj.*)

Kuracisto (*paŝas al la admiralo.*)

De maldekstre enpaŝas fr-ino Elinjo.

Elinjo (*mallaŭte al Anjo, kiu staras apud Ruĉjo*): Anjo, koreto mia!

Anjo: Kio nova, fr-ino Elinjo?

Kuracisto: Jes ja, jes ja, kompreso Priessnitz. (*al Ruĉjo*) Mi bedaŭras, je la naŭa kaj duono ĝi nepras.

Elinjo: Estas la naŭa kaj duono. (*subvoĉe al Anjo*) La poŝtoficisteto mesaĝis, ke vi tuj iru al li en afero vive grava. (*laŭtvoĉe*) Alvenis nia tempo. Kompreso kaj iom da klaĉado, poste bona dormo. Venu!

Ruĉjo: Ĉu ŝi ne povus ankoraŭ iom resti?

Anjo: Ne, Ruĉjo, pli bone estos, se hodiaŭ mi enlitiĝos frue. Miaj nervoj estas tre taŭzitaj. Bonan nokton! Kaj ĝis revido matene!

Ruĉjo: Ĉe la teniso.

Anjo: Sed ne frue.

Ruĉjo: Ne, ne. Je la naŭa. Bonan nokton! (*Ili manpremas.*)

Anjo eliras maldekstre kun la asistantino. Ruĉjo sidiĝas apud sia patrino por kibici.

Kuracisto (*al la admiralo*): Mi estas ravita de la gesto, ekscelenca moŝto, sed mi kredas, ke mi ne trompiĝos juĝante, ke ĝi havis iom da akro ankaŭ kontraŭ mi.

Admiralo: Ĝuste!

Kuracisto: Ĝuste pro tio degnu al mi certarilate pravigi mian starpunkton en ĉi tiu afero antaŭ via ekscelenco. Ekzistas aferoj, kiujn mi devas prisilenti al aliuloj, sed kiujn mi povas diri al ĝentlemano inter kvar okuloj. Via ekscelenco kun via granda aŭtoritato elpaŝis sindevontige por f-ino Paulino, kiu havas ĉi tie, mi scias, certajn celojn. Mi miras, ke via ekscelenco...

Admiralo (*interrompas lin, decide*): Vi ne komprenas tion. Mi ne esploras pri f-ino Paulino, ŝia fakturo ne interesas min, nek ŝiaj planoj, nek ŝiaj celoj; la fraŭlino estas filino de unu el miaj kamaradoj, kaj kvankam mi ne konis, neniam mi vidis lin, sed ĉi tiu knabino estas la filino de iu mia mortinta kamarado, kaj kiu aŭdacus ofendi ŝin, tiu alfrontos min. (*Turnas la dorson al la kuracisto kaj malrapide iras al la briĝantoj.*)

Kuracisto: Al mi tio jam tro sufiĉas. Pardonu min, sinjorinoj! (*Elvokas.*) Mi petas vin, kolego. (*La piano silentiĝas, la asista kuracisto enpaŝas.*) Mi petas vin, tuj voku telefone lian grafan moŝton Armaila en Triesto! (*silabante*) Ar-ma-i-la.

Asista kuracisto: Kiel vi deziras. (*Eliras.*)

La kuracisto malrapide iras al la briĝantoj. La scenejo mallumiĝas.

Sesa bildo

*La poŝtofiĉeja kontoro, kiel en la antaŭa akto. Kvaronhoro
post la antaŭa bildo.*

*La poŝtoficisto sidas kun la kapo en la manoj ĉe la tablo, sur kiu staras
morsilo. Fone en angulo sidas ĝendarmo modeste kun bajoneta fusilo,
ĉapelo sur la kapo. La morsilo mallaŭte frapadas.
Post mallonga paŭzo enpaŝas Anjo.*

Anjo (*ĉirkaŭrigardas timeme*): Bonan vesperon!

Poŝtoficisto (*alarmiĝas, alrigardas, stariĝas*): Anjo...

Anjo: Vi mesaĝis, ke mi tuj venu en vive grava afero. Kio denove okazis?

Poŝtoficisto (*ne respondas.*)

Anjo: Kio okazis?

*Anjo rigardas de la poŝtoficisto al la ĝendarmo, poste de la ĝendarmo
reen al la knabo. La morsilo silentiĝas.*

Poŝtoficisto: La s-ro serĝento ĉeestas oficiale. La s-ro serĝento venis por mi. Mi estas arestita, Anjo. (*Intermetas paŭzon.*) Nun mi devas atendi oficiston, kiun oni komandis anstataŭ mi, por ke la kontinueco de la servo ne interrompiĝu.

Longa paŭzo.

Anjo (*senvorte, tenere brakumas lin. Poste al la ĝendarmo*): Mi petas vin, s-ro serĝento...

Ĝendarmo (*stariĝas.*)

Anjo: Mi petas vin, s-ro serĝento, mi volus paroli kun la s-ro poŝtoficisto.

Ĝendarmo: Bonvolu, vi povas.

Anjo: Sed... mi volus paroli kun li inter kvar okuloj.

Ĝendarmo: Mi ne rajtas eliri, kara fraŭlino.

Anjo: Bonvolu fari al mi la komplezon... sidu dume en la antaŭĉambro, rigardu, ferkrado estas sur la fenestro, li ne povas eskapi... estu komprenema!

Ĝendarmo (*milde*): Mi tre bedaŭras, kara fraŭlino.

Anjo: Estu komprenema! Faru al mi la komplezon. (*Mallaŭte, emociite*): Mi estas... la amatino de la s-ro poŝtoficisto.

Ĝendarmo (*post iom da hezito eliras.*)

Anjo: Kio okazis?

Poŝtoficisto (*kun haltoj, en sufokita voĉo rakontas*): Jam de tagoj sekrete estas farata esploro kontraŭ mi. Mi ne sciis tion. Oni povis nenion malkovri, sed hodiaŭ, ŝajnas tiel, ke oni trovis ian pruvon. Mi scias nur, ke antaŭ unu horo venis por mi tiu ĝendarmo. Oni eldonis kontraŭ mi arestan ordonon. El la centro venos oficisto. Ĉiuminute mi atendas lin. Tiam oni forkondukos min. (*Longa paŭzo.*) Antaŭ dek minutoj la doktoro el la sanatorio igis voki telefone grafon Armaila en Triesto, sed mi ne plusendis ĉi tiun vokon. (*Longa silento.*) Tio estis mia lasta donaco al vi. (*Silentiĝas.*)

Anjo: Kaj?

Poŝtoficisto: Ne estas „kaj”. Nur ĝis ĉi tie. Kaj ne plu. Mi jam faris konton pri ĉio. Nun turmentas min nur la penso, ke certe ankaŭ vin oni enigis... oni entiros...

Anjo (*levas la ŝultrojn.*)

Poŝtoficisto: Vi ne konas la funkciadon de la poŝto. Vi ankaŭ ne scias, kion ni faris... kion mi faris. Tio apartenas jam al la kriminala..., kriminala kodo... (*Lia voĉo rompiĝas, li silentiĝas.*)

Longa paŭzo. Poste ekstere voĉoj.

Anjo: Kio estas tio?

Poŝtoficisto (*atentas*): La ĝendarmo parolas kun iu. (*Ili subaŭskultas.*)

Anjo: Tiu estas la voĉo de la ĉefkuracisto.

Kuracisto (*frapas kaj tuj enpaŝas. Returnas sin al la antaŭĉambro*): Bonvolu! Estas tiel, kiel mi diris.

Ruĉjo enpaŝas.

Kuracisto: Jen. Ĉu mi mensogis? (*Ili silentas. Ruĉjo staras kun klinita kapo. La kuracisto iradas tien-reen. Haltas*): Ŝi diris, ke ŝi enlitiĝos por dormi. Ŝi ankaŭ kuŝiĝis. Vestita ŝi enlitiĝis, tiris sur sin la kovrilon, tiel ŝi akceptis doktoron Tiring. Tio okazis antaŭ malpli ol kvaronhoro.

Kaj nun ŝi estas ĉi tie. (*Iradas tien-reen. Haltas.*) Se ankaŭ mi estus tiel facilkreda kiel vi ĉiuj, mi ne estus farinta tion, kion mi faris: hodiaŭ posttagmeze mi igis observi ĉiun ŝian paŝon. (*Sidiĝas apud Anjo.*) Nu, ĉu la s-ro ĉefinĝeniero eraras?

Anjo: Li eraras. Tiu afero havas nenion komunan kun ĉi tio.

Kuracisto (*kapbalancante antaŭ si*): „Nenion komunan.”

Anjo: Mi enpoŝtigas urĝajn telegramojn al mia patrino, jam ankaŭ antaŭ vespermanĝo mi estis ĉi tie, kaj mi urĝe devas ricevi la respondon, vi bone scias, ke miaj fakturoj...

Ruĉjo: Lasu tion, Anjo!

Anjo: Kial mi lasus? En kia tono vi diras tion? Ĉu mi eble mensogas?

Ruĉjo: Ni lasu tion, Anjo!

Anjo: Kio estas tio, sinjoro? Vi venas post mi nokte en la poŝtofic-
ejon por spioni, kiam vi vere povus scii... (*Silentiĝas, sentas, ke ŝi diris pli ol necese. Rigardas al la poŝtoficisto.*)

Poŝtoficisto: Mi ne scias, sinjoro, kiu vi estas, nur konjektas, ke vi estas tiu, kiu... al kiu Anjo estas enamiĝinta.

Ruĉjo: Sed sinjoro!

Poŝtoficisto: Bonvolu ne interrompi min, mi jam ne havas tempon por diskuti. La ĝendarmo, kiu sidas ekstere en la antaŭĉambro, atendas min, s-ro Rudolfo, kaj forkondukos min, kaj tiam vi restos sola en la mondo kun ĉi tiu knabino.

Ruĉjo: Ĉu la ĝendarmo... forkondukos vin?

Kuracisto (*al Ruĉjo*): Nu, vidu, kara. Mi ne estas tiel malbone informita. Ĉi tiu malfeliĉa knabo vojeraris en oficialaj aferoj. Nun ni jam scias, kial ne iradis-venadis la leteroj kaj telegramoj. Jam pasis almenaŭ duonhoro, ke mia kontoro vokis telefone grafon Armilla en Triesto, sed ĝis nun li ne anoncis sin. Certe ankaŭ ĉi tiun vokon li ne plusendis.

Poŝtoficisto: Vere ne.

Kuracisto: Nu, kion mi diris. Malfeliĉa knabo, tiajn servojn li faris al f-ino Paulino.

Anjo: Se li faris al mi servojn, li faris tial, ke en li loĝas humaneco, kaj li volis helpi al mi. Mi ne permesas, ke la s-ro doktoro parolu pri tio

en tiel ironia tono.

Ruĉjo: Temas ne pri tio, Anjo. Temas pri io tute alia. Mi estas kontraŭ ĉi tiu sinjoro... kontraŭ via amato nun mi estas senpova...

Anjo: Kio? Kiel vi aŭdacis tion diri?

Ruĉjo (*daŭrigas pli laŭte*): ...kontraŭ via amato mi estas senpova. Se ankoraŭ hieraŭ mi estus tiel alfrontinta lin, ni aranĝus tion inter ni tiel, kiel du junaj viroj kutimas fari. Sed mi ne povas respondeciĝi homon, kiu estas sub la povo de ĝendarmoj kun bajoneta fusilo, kaj kies mano estas nur ne katenita. Tia malkuraĝulo mi ne estas.

Anjo (*preskaŭ kriege*): Li ne estas mia amato!

Ruĉjo (*kun levita voĉo*): Ĉi tiu sinjoro...

Anjo (*kriege*): Ne sinjoro! Ne aŭdaci moki lin!

Ruĉjo (*kun tre levita voĉo*): Ĉion mi aŭdacas! Mi havas rajton je tio! Mi havas rajtojn! Ni devontigis nin reciproke, ni ambaŭ! Mi ne volas stari antaŭ ĉi tiu kiel ia rifuzita enamiĝinto, kiu senrajte respondeciĝas vin! Vi estas mia fianĉino, kaj se ĉi tiu sinjoro ne estis via amato, tiam li bonvolu konfesi tion aperte antaŭ vi, ĉar mi volas aŭdi, kion li respondas.

Anjo: Kio? Ĉu vi volas konfronti min kun li?

Ruĉjo: Jes. Ĉar nun li ne mensogos.

Anjo: Malsaĝaĵo! Se li estus mia amato, li neos tion!

Ruĉjo: Ne teroru lin! Diru al li en la okulojn, ke vi estis mia fianĉino!

Anjo: Nun... ĉi tie... antaŭ li..., ĉu mi faru amdeklaron al vi?

Ruĉjo (*kriante*): Kial ne, se vi ne estis lia amatino?!

Anjo: Kio? Nur pro tio, ke... por savi min, ĉu mi nun trapiku la koron al ĉi tiu malfeliĉa knabo, kiun oni post dek minutoj forkondukos en la prizanon, ĉar li estis bonvola al mi... ĉar li enamiĝis al mi, ĉu? (*Kriante klarigas.*) Pro mi oni kondukos lin en prizanon! Kaj ĉu mi pagu al li per tio? Kio mi estas?! (*Vidas, ke la poŝt oficisto plorante klinas sin sur la tablon. Ŝi alkrias lin.*) Ne ploru! (*decideme*) Jes ja, se vi postulas, mi eldiras antaŭ li... jes... mi estis via fianĉino, sed... (*kriante*)... sed nun ĉi tie ne eblas triumfi super ĉi tiu homo! Mi ne toleras tion! Mi estis via fianĉino... sed li... (*ree kriante*) Ne ploru! Kaj li estis mia amato! (*tremante, kriante*) Ne pro la oficejo mi venadis ĉi tien, pro li mi venadis! Jes

ja... ĉiun nokton... mi eskapis al li... al mia amato... al mia amato... al mia amato! (*Spirperde serĉas apogon sur io.*) Nu, Ruĉjo Pál... nun mi... konfesis... antaŭ li..., ke mi estas via fianĉino.

Longa paŭzo.

Ruĉjo (*al la kuracisto*): S-ro ĉefkuracisto, mi havas ĉi tie jam nenian farendon.

Paŭzo.

Kuracisto (*al la poŝtoficisto, klinita servorte sur la tablon*): Malfeliĉa knabo. Mi konas lin de lia infanaĝo. (*Karesas la kapon de la knabo.*) Malfeliĉa fileto. (*Tenas paŭzon, poste turnas sin al Anjo.*) Mi nur ne komprenas, karega filino, kiel vi imagis, ke vi povas tion fari ankaŭ pli longe. Ĉu vi iom ne antaŭpensis?

Anjo: Ne.

Kuracisto: Kion do vi volis?

Anjo: Gajni tempon.

Kuracisto: Sed nur unu tago, du tagoj, ni diru semajno, fine tamen ĉio malkovriĝus.

Anjo: Du tagoj... unu tago... unu horo... ankaŭ tio estas: tempo.

Kuracisto: Siaspeca fantazio.

Anjo: La fantazio de la s-ro ĉefkuracisto estas alia, kaj alia estas mia fantazio.

Kuracisto: Do ĉiam plu vi rezervas, ke s-ro Georgi eraras.

Anjo: Jes.

Paŭzo.

La poŝta ĉefoficisto enpaŝas. Post li modeste envenas la ĝendarmo, stariĝas flanken.

Ĉefoficisto: Mi estas poŝta ĉefoficisto. (*Klinas sin.*)

Kuracisto: D-ro Conrad.

Poŝtoficisto (*stariĝas*): Mi estas... tiu certa oficisto.

Ĉefoficisto: Poŝta ĉefoficisto Meissner, vi certe scias, kial mi estas ĉi tie.

Poŝtoficisto: Mi scias. Vi transprenas la servon, dum okazas aran-

ĝoj.

Ĉefoficisto: Estas tiel.

Poŝtoficisto (*iras kun li al la tablo, silente transdonas la elmetitajn foliojn*): Jen la formularoj. Tio estas la taga spezo. Jen la pagolisto. Ĉi tiuj estas la poŝtaj valormarkoj. Jen la kasa konto. Tio ĉi tie estas la tarifa baremo kaj la kabla protokolo.

Ĉefoficisto: La taglibro de ĝiraj enspezoj?

Poŝtoficisto: Jen ĝi.

Ĉefoficisto: Dankon.

Mallonga paŭzo. Dume la ĉefoficisto starante trarigardas la foliojn.

Kuracisto: Ĉu la s-ro ĉefoficisto transprenas la servon?

Ĉefoficisto: Jes.

Kuracisto: Mi estas d-ro Conrad, ĉefkuracisto direktoro de la sanatorio en Unterbach. La sanatorio havas permeson de la poŝta direkcio uzi la telefonon en ajna tempo taga aŭ nokta.

Poŝtoficisto (*al la ĉefoficisto*): Jes.

Kuracisto: Mi petas vin, se vi jam transprenis la servon, bonvolu tuj telefonvoki al mi grafon Armila en Triesto.

Ĉefoficisto: La numero?

Poŝtoficisto (*al la ĉefoficisto*): Triesto 341. Tra la linio kvar.

Ĉefoficisto: Jes, sinjoro. Mi tuj vokas la numeron. (*Sidiĝas al la telefono kaj mallaŭte parolas, murmuras kun la centralo.*)

Kuracisto (*atendas iom, silentas, sed malgraŭ tio, ke la ĉefoficisto plu murmuras, mallaŭte alparolas Anjon*): Nu, kara filino?

Anjo (*alrigardas lin.*)

Kuracisto: Ĉu ĉiam plu vi volas gajni tempon? Nun jam vi povas vere konfesi. Ne valoras nei. Vi povas gajni kelkajn minutojn da tempo, se vi silentas. Kiom estas kelkaj minutoj?

Anjo: Ankaŭ ili estas iom. Ĉiu sekundo estas iom.

Pli longa paŭzo, dum kiu la ĉefoficisto, sidanta ĉe la telefono, kelkfoje levas la aŭdilon kaj tre mallaŭte enparolas. Anjo sidas apatie sur seĝo. La ĝendarmo streĉe staras kaj atendas. La kuracisto atendas, apogita al la muro. Li konsultas sian horloĝon. La poŝtoficisto ankoraŭ

elprenas kelkajn librojn kaj dokumentojn el la tirkesto. La morsilo komencas monotone frapadi en la silenton. Poste ĝi silentiĝas. La ĉefoficisto stariĝas, paŝas al la morsilo, rigardas la rubandon. Poste li turnas sin al la poŝtoficisto, kiu staras proksime.

Poŝtoficisto (mallaŭte, murmure): Jen ankoraŭ la listo pri enmanigoj. Ĉi tio estas la kontolisto, sed ankoraŭ laŭ la malnova, ne la nova instrukcio, ni ankoraŭ ne ricevis tiun, oni bezonas urĝi ĝin.

Ĉefoficisto: Ĉu ĉi tio estas la registro pri valormarkoj?

Poŝtoficisto: Jes. Kaj jen estas la resumo de ĝiroj... la ŝparkasa listo kaj fine la administracia tabelo.

Ĉefoficisto: Ĉu vi jam transdonis la liston de enpagoj?

Poŝtoficisto: Jes, ĵus. Jen tie ĝi estas (Montras ĝin.)

Ĉefoficisto: Dankon. (Foliumas la dokumentojn, sidiĝas kaj studas ilin.)

La morsilo komencas frapadi.

Dume la poŝtoficisto iras al la ŝranko, elprenas sian mantelon, kepon, metas aĵetojn el la ŝranko en sian mansaketon, fermas la ŝrankopordon, staras kun la mantelo sur la brako, kepo en unu mano, mansaketo en la alia.

Poŝtoficisto (ridetante, mallaŭte al la ĝendarmo): Ni povas iri.

Ĝendarmo (ekmovas sin, faras paŝon.)

La morsilo mallaŭte frapadas. La poŝtoficisto ekiras, haltas antaŭ la kuracisto.

Poŝtoficisto: Adiaŭ, s-ro doktoro!

Kuracisto: Ĝis revido, fileto. (La morsilo silentiĝas. La kuracisto tiras al si la kapon de la poŝtoficisto, premas ĝin al sia brusto, karesas ĝin.) Matene mi vizitos vian patrinon. Ĉu vi havas advokaton? (La poŝtoficisto ploras senvoĉe, ne respondas.) Nu, ne ploru, filo! Ĉu vi havas advokaton?

Poŝtoficisto (ankoraŭ sur la brusto de la kuracisto): Ne.

Kuracisto: Mi zorgos pri li. Kaj ne zorgu pro via patrino... dum mi estas ĉi tie. (kun emociita voĉo) Nu, nun iru, filo!

Poŝtoficisto: Adiaŭ, Anjo! (Ekregas sin kaj iras ĝis la pordo.)

Anjo: Adiaŭ!

Ĝendarmo (streĉe vizier-salutante): Mi deziras bonan nokton!

Kuracisto: Bonan nokton!

La poŝtoficisto eliras, la ĝendarmo post li.

Longa paŭzo. Silento. Anjo sidas apatie sur sia loko. La ĉefoficisto disaranĝas, klasifadas silente la dokumentojn. Dum la paŭzo la morsilo mallonge frapas, poste silentiĝas. La kuracisto rigardas sian horloĝon.

Ankoraŭ iom daŭras la silento.

Poste eksonoras la telefono.

Ĉefoficisto (stariĝas, iras al la telefona tablo, sidiĝas apud la aparato kaj tute mallaŭte enmurmuras, parolas kun la centralo, oni ne komprenas, pri kio. Poste demetas la aŭdilon, sidas, atendas. Post kelkaj sekundoj denove aŭdiĝas akra sonorado. La ĉefoficisto deprenas la aŭdilon, diras nur kelkajn vortojn, demetas ĝin sur la tablon, star-iĝas. Al la kuracisto): Jen Triesto.

Anjo apatie stariĝas kaj malrapide eliras.

Kuracisto (iras al la telefono, sidiĝas): Ha lo, ĉu Triesto? Ĉu grafo Armila? Ĉu persone? Ĉi tie parolas ĉefkuracisto d-ro Conrad el Unterbach. Bonan vesperon, ekscelenco! Finfine mi trovas kontakton. Mi jam plurfoje permesis al mi skribi kaj telegrafi al via ekscelenco pri tre kurioza afero, kiu certe... (Parolas plu.)

La scenejo mallumiĝas.

Sepa bildo

La ĉambro de Anjo en la sanatorio. Blanka sanatoria ĉambro kun lito.

Telefono sur tableto. Fone ĝenerala enirejo. Dekstre, tute antaŭe pordo al banoĉambro. La 11a horo nokte.

Duonhoron post la antaŭa bildo. Anjo kuŝas en malpeza negliĝo sur sia kovrita lito. Fr-ino Elinjo sidas apud la lito sur seĝo kaj mallaŭte, tre silente ploretras. Post paŭzeto.

Elinjo: Ĉu vi bezonas ion, koreto mia?

Anjo (*tre mallaŭte*): Ne... mi bezonas nenion.

Nova paŭzo.

La ĉefkuracisto, post frapo, enpaŝas en blanka kitelo.

Kuracisto (*ĉe la lito, al Elinjo, mallaŭte*): Ĉu ŝi dormas?

Elinjo (*mallaŭte*): Ne. Nur ŝi fermis la okulojn.

Kuracisto (*rigardas Anjon dum tempo. Turnas sin al Elinjo*): Ĉu ŝi fartas pli bone?

Elinjo: Iom ŝi trankviliĝis.

Kuracisto: Ĉu vi donis al ŝi *Tinctura Valeriana*?

Elinjo: Jes.

Kuracisto: Kiom?

Elinjo: Dek kvin gutojn.

Kuracisto: Post duonhoru vi povos doni al ŝi pliajn dek kvin.

Anjo (*etendas sian manon el la lito al la doktoro.*)

Kuracisto (*prenante ŝian manon*): Filineto, vi devus bele malvesti vin kaj normale enlitiĝi, ne tiel...

Anjo (*mallaŭte*): Ĉu vi parolis kun Triesto?

Kuracisto: Jes.

Anjo (*fortiras sian manon.*)

Paŭzo.

Anjo: Ĉu kun la grafo?

Kuracisto: Jes. Mi ĵus revenis el la poŝtoŝicejo.

Paŭzo.

Kuracisto: Ne ploru, filineto! La grafo parolis senfine saĝe kaj bone. Vere brava homo estas la maljuna grafo. Li ĉion rakontis al mi. Silente, saĝe kaj milde ni solvos ĉi tiun aferon. Estas nenia kaŭzo por eksciti vin, filineto. Mi havas ĉe mi por via dispono monon, fervojan bileton, ĉion. Nun bone ripozu, nun vi dormos... kaj matene kun fr-ino Elinjo vi oportune enpakos. Tagmeze vi forveturos. Nun jam, mi kredas, tio estos plifaciligado ankaŭ por vi... forveturi de ĉi tie, el ĉi tiu medio. Kaj trankvile vi povos veturi hejmen, hejme la grafa moŝto subtenos vin, lia kontoro estas instrukciita, vi ne bezonas timi, neniu mis-

traktos vin. Hejmenveturu kun fido! (*post paŭzeto*) Kaj mi donas mian honorvorton, ke ĉi tie neniu ekscios ajnon el tio, kion nun la grafo telefone diris al mi. Pri tio vi povas esti trankvila. Via memoro en ĉi tiu instituto restos pura kaj nobla por ĉiuj, la memoro de nia kara, modesta, bonanima malsanulineto. Por ĉiuj...

Anjo (*mallaŭte*): Por miaj... miaj du patrinoj...

Kuracisto: Kompreneble.

Anjo: ... por la maljuna admirala moŝto...

Kuracisto: Li ekscios nenion. Jam ankaŭ pro tio, ke kiu povas esti tiel nobla kiel li, tiu ne devas ruinigi siajn iluziojn. Ne zorgu, mi estas kuracisto, mi povas gardi sekretojn. Tion ni devas tre bone kapabli. Ĉe la plej multaj homoj, kiel ankaŭ tra la plej dika muro, la aero translikigās, tiel translikigās sekretoj ankaŭ tra honorvortoj. Ne vortoj estas la solaj perfiduloj de sekretoj; unu senkulpa rigardo, unu gesto, unu lip-tiro... Estas homoj, kiuj kapablas movi ankaŭ siajn orelojn... Nu, nun vi jam ankaŭ ridetas. Do nun ripozu, filineto, dormu! Mi ne adiaŭas vin, ĉar morgaŭ ni ankoraŭ revidos nin. Mi akompanos vin al la trajno, filineto. (*Kisas ŝian frunton.*) Ĝis revido!

Anjo (*mallaŭte*): Ĝis revido!

Kuracisto (*al Elinjo*): Mi preferus, se vi donus al ŝi anstataŭ *Tinctura Valeriana* unu kaj duontablojdon da *Phanodorm*, por ke ŝi normale dormu.

Elinjo: Jes, s-ro ĉefkuracisto.

La kuracisto foriras.

Paŭzo. Silento.

Elinjo (*klinas sin super ŝin*): Ĉu vi bezonas ion, koreto mia?

Anjo: Retrankviliĝi... bone tepidan banon... (*Leviĝas, sidiĝas litrande.*) Fr-ino Elinjo, vi povas fari tiel mildan, tepidan banon...

Elinjo: Bone, karulinjo. Mi jam faras ĝin. (*Rapide iras en la banoĉambron, kies pordo restas malfermita. Oni ne povas envidi. Anjo sidas litrande. Post mallonga paŭzo el la banoĉambro*) Estos dudek ses gradoj, kara.

Anjo: Dankon, Elinjo.

Elinjo (*el la banoĉambro post mallonga paŭzo*): Kaj vi sidados en ĝi dudek minutojn.

Anjo: Jes.

Mallonga paŭzo.

Anjo: Fr-ino Elinjo!

Elinjo (*el la banoĉambro*): Kion vi bezonas, karega?

Anjo: Kaj ne forgesu la dormigilon, kiun menciis la s-ro ĉefkuracisto. Mi tre ŝatus... profunde dormi...

Elinjo (*elvenas el la banoĉambro*): Kiel mi forgesus ĝin, kara?! Mi iras kaj alportos ĝin. Via bano estas preta. (*Eliras.*)

Anjo elprenas el la ŝranko brilantan revolvereton, kaŝitan inter la tolaĵoj, volvitan zorge en tuko; ĉirkaŭrigardas kaj eniras la banoĉambron, kies pordo restas duone malfermita, de kie post mallonga paŭzo aŭdiĝas la knalo de la revolvero.

Paŭzo.

Elinjo (*enpaŝas kun skatoleteto en la mano. Metas ĝin sur la ŝranketon apud la lito*): Jen la Phanodorm. Mi elmetas unu kaj duonon da tablojdoj sur la noktoŝranketon. La ceterajn reen. (*Elmetas ilin sur la noktoŝranketon, la skatoleton enpoŝigas.*) Kaj dume mi preparos vian liteton. (*Forprenas la kovrilon de la lito kaj preparas la litaĵon. Dume, ne konstante, parolas.*) La s-ro ĉefinĝeniero veturos morgaŭ frumate ne. Ĉi tiun homon mi vere ne bedaŭras... Poste lunde forveturos la bona admirala moŝto... poste la familio Exer kaj Goriano... fine ĉiuj forveturos kaj daŭre venos novaj, interŝanĝiĝos la tuto... Nur ni restos ĉiufoje, la doktoroj kaj la flegistinoj... Tio jam estas tiel en sanatorioj. (*La lito estas preparita.*) Nu, la liteto estas preta. (*Prenas la noktoĉemizon.*) Mi enportas la noktoĉemizon, ĉu bone?

Neniu respondo.

Elinjo: Ĉu mi povas eniri, kara, kun la noktoĉemizo,

Neniu respondo.

Elinjo: Anjo! Ĉu mi povas eniri?

Neniu respondo.

Elinjo lasas fali la noktoĉemizon kaj timigita, eniras la banoĉambron. La pordo restas tute malfermita. Mallonga paŭzo. Elinjo elkuras el la banoĉambro, stumblante, senvorte, terurita, paŝas rekte al la telefono.

Elinjo (*mallaŭte, rapide*): Kuraciston... en n-ron dudek tri, tuj, plej rapide! (*Demetas la aŭdilon kaj rekuras en la banoĉambron.*)

Paŭzo.

La ĉefkuracisto rapide venas, ĉirkaŭrigardas, vidas la malplenan liton, la malfermitan banoĉambran pordon, rapide eniras. La pordo restas malfermita. Pli longa paŭzo. Poste fr-ino Elinjo tre malrapide elvenas, sidiĝas sur seĝo tuj ĉe la banoĉambra pordo kaj mallaŭte skuploras. Paŭzo. Poste malrapide elvenas ankaŭ la kuracisto, tre malrapide iras al la telefono, tie sidiĝas, enpensiĝas por tempeto, poste levas la aŭdilon kaj simple, mallaŭte telefonas.

Kuracisto: Mi petas vin, voku tuj Trieston, tricent kvardek unu, grafan moŝton Armaila.

Kurteno



Ferenc Molnár (1878-1952): hungara verkisto, dramisto, ĵurnalisto, milita korespondanto naskiĝis en germana juda familio. Jam frue kontribuis al pluraj gazetoj, samtempe komencis verki literature. Estis majstro de amuza rakontado, tamen malantaŭ la distra formo kaŝiĝas ĉiufoje serioza socia kritiko, kiun li ofte esprimas per satiraj rimedoj. Liaj verkoj aperis en multaj lingvoj, liaj teatraĵoj estis plurlande surscenigitaj, ankaŭ filmitaj. *La nekonata knabino* rakontas sortoturnojn de tavernaĉa dancistino, kiu trovinte hazarde riĉan protektanton, kaj havante elstarajn

kapablojn subite leviĝas socie kaj akceptiĝas en la elita societo de sanatorio, kie ŝi trovas la amon eĉ de du viroj kaj la avida deziratan amoplenan atmosferon.

* * *

Anjo (ne lasas lin paroli. Al la kuracisto): *Kaj ne estas vero, ke mi delogis tiun knabon! (krie) Kia vorto, ke mi delogis lin?! Ili ekamis min, ili ĉiuj, la karegaj maljunulinoj kaj ankaŭ ilia filo... mi estas fiera pri tio... mi estas feliĉa pro tio... mi estas mizera, malriĉa orfino... mi havas en la vivo nenion... krom luktado. Mi jam rompiĝis kaj malsaniĝis pro tio... kaj tiam mi venis ĉi tien, kaj ĉi tie mi trovis iom da varmo, iom da sekureco, amon... mi neniam estis feliĉa en mia vivo, nur nun... (al Georgi), kaj vi nun volas ĉion forpreni de mi... vi volas elĵetigi min nur pro tio, ke vi nebule memoras ion... (krie), kaj eksciu, ke se mi estus centoble tio, kio vi diras min, vi egale ne devus forpreni mian vivon! Ĉu tion instruis al vi Kristo, la mizerikorda? Respondu! Ĉu tion Li instruis?... Se mi estus, kio vi min diras... eĉ tiam vi ne devus treti min en koton! Tiel memcerte elpaŝi... pro necerta memoraĵo, pri kiu vi ne kuraĝus ĵuri antaŭ tribunalo... se temus pri via vivo aŭ morto... vi ne kuraĝus ĵuri... kvankam ĉi tie... temas ja pri vivo aŭ morto! (Ne ploras, sed multe emociita, malfortiĝinta, kroĉas sin al seĝo.)*